

jaro 5 · junio 2009 · n-ro 18

Femina

revuo en esperanto · ne nur por virinoj



**Kia modelo
por transnacia familio?**

Kian familion protektu la Eŭropa Konstitucio?

Juan Antonio Giménez
PL Pintor Segrelles, 1-B-19,*
46007 VALENCIA

de Leen Deij

Eŭropo bezonas konstitucion. La konstitucio protektu la modernajn formojn de familio: familioj kun unu patro aŭ patrino, familioj sen infanoj, familioj kun gejjaj patroj aŭ patrinoj, familioj, en kiuj ambaŭ gepatroj laboras plentempe ekstere aŭ en kiuj la patro aŭ patrino plentempe aŭ duontempe mastrumas kaj vartas la infanojn.

Familio konsistas el unu aŭ pluraj plenkreskuloj, kiuj zorgas pri unu aŭ pluraj propraj aŭ adoptitaj infanoj. Familio povas esti ankaŭ kolektivo el nedefinita nombro da personoj. Ĉiuj familioj estas egalrajtaj. La homoj mem decidas pri sia komunvivo.

Familioj faras la socion kohera. Al la kohereco de la socio la klasika familio, geedzaj kun infanoj, ofte ne kontribuas. Multaj gepatroj malbone edukas, infanoj estas neglektataj, la nombro da ekسدzigoj estas tre alta, pro kio suferas precipe la infanoj mem. Multaj geedzaj ne scias kombini laboron kun familia vivo. Post la pordo de multaj klasikaj familioj regas malpaco.

Eŭropo bezonas konstitucion kiu protektu virinojn kaj gejoj, kiu garantiu pensliberon, liberan gazetaron, esprimliberon kaj la homan integrecon – kaj kiu malebligu diskriminacion de kaj fare de eklezioj. Al tia Eŭropa Konstitucio oni povos referenci, se politikistoj ignoras la principon de aparteco inter eklezioj kaj ŝtato. La ŝtato devas ne interveni en ekleziajn aferojn kaj la eklezio ne interveni en ŝtatajn aferojn. La eklezia potenco kaj la ŝtata potenco ne estu en la samaj manoj.


En pluraj eŭropaj landoj la aparteco inter eklezio kaj ŝtato estas nur ŝajna. Naciaj politikistoj kaj ekleziuloj trovas la apartecon ne dezirinda. Tial mi ŝatus referenci al la Konstitucio de Eŭropo. La


eŭropa konstitucio portu lumon en la krepuskon, en kiu troviĝas ankaŭ maldekstraj politikistoj. La konstitucio sialanke ne estu krepuska pro ĵonglado per difinoj. Ĝi devas esti klara konstitucio pri la fundamentaj rajtoj kaj devoj de la civitanoj. Kaj oni devas nomi ĝin Konstitucio, ne alimaniere.

Pro la malakcepto de Francio kaj Nederlando politikistoj proponis simplan "traktaton" sen konstitucia karaktero, kvazaŭan konstitucion, kiun naciaj politikistoj facile metos flanken en okazo de bezono. Eŭropo bezonas konstitucion, kiu gardos nin kontraŭ tia manipulado. Konstitucio bazita sur sekulara Eŭropo kun neŭtralaj ŝtatoj. Nur tiel eblas stabila, plurforma kaj multkultura Eŭropo. Irlando malakceptis ankaŭ la kvazaŭan konstitucion, pro kio stagnas la sinorganizado de la Unio. La nederlanda registaro evitis novan "Ne!" malpermesante denove referendum.

Mi estas eŭropano pli ol nederlandano. Sed mi devas konfesi, ke mi ne bone komprenas kiuj decidas, kiuj respondecas, kiom valoras la abundaj paktoj kaj deklaroj. EU-parlamentano, kiu studis juron, diris, ke ankaŭ li ne ĉiam komprenas.

Mi estas eŭropano pro idealo: pliharmoniigi la homan familion, plivastigi la spiritan horizonton, pensi laŭ diversaj perspektivoj, kunlabori transnacie. La celo estas sekureco, libero kaj prospero ĉiunivele. Tion ni atingos ne per renverso, sed per reformo, paŝon post paŝo – post longa laboro, jes! Ne estas afero de





jaroj. Estas afero de generacioj... Kaj ni ne bezonas esti certaj pri vera sukceso por tamen klopodi.

Dudek sep ŝtatestroj devas interkonsenti pri nova Eŭropa Konstitucio kun la konsento de dudek sep naciaj parlamentoj kaj kvincent milionoj da civitanoj, el kiuj nur tre malmultaj sentas sin eŭropanoj. Kiel motivi konsiderindan nombron? Ankaŭ por tio ni bezonas eŭropan konstitucion ne burokratan, eŭropan registaron, EU-parlamenton kaj EU-prezidenton. La konstitucio celu ne koncentri potencon, sed bridi ĝin.

Eŭropa Unio estis fondita pro komercaj motivoj. Dekstraj politikistoj uzas ĝin serve al libera, sendogana komercado. Mallonge: EU servas la kapitalismon. Tial en la Esperanta Civito la Ruĝa Listo ĝin malaprobas.

Iom post iom enskribiĝis sur la eŭropan tagordon pli da socialaj kaj medioprojektaj temoj. EU fariĝis ankaŭ kultura. Por aliĝi al EU ŝtatoj devas: 1) situi en Eŭropo kaj 2) akcepti la kriteriojn de Kopenhago: demokratio, juro, homaj rajtoj. Tial mi opinias, ke en Esperantio la Nova Maldekstro ĝin povas kritike subteni.

Pri la socialaj problemoj la ŝtatoj postulas aŭtonomion. Efektive multajn socialajn problemojn oni devas solvi surloke. Eŭropo povus doni nur direktivojn. Imagebla estas eŭropa malpermeso kontrati pritrancō de knabinoj kaj deviga

edzino. Sed la ŝtatoj (ankoraŭ) ne akceptas unuformajn regulojn pri samseksemo, abortigo kaj eŭtanazio.

El la 27 membroŝtatoj nur tri donas al gejoj kaj gejinoj ĉiujn civilajn rajtojn. En la pli multaj ŝtatoj la eklezia potenco malebligas aŭ draste malpliigas la eblecon de abortigo kaj eŭtanazio al ĉiuj civitanoj, kun aŭ sen konfeso. Mi jam diris: la apartigo de ŝtato kaj eklezio estas nur ŝajna. Belgio, Hispanio kaj Nederlando oficialigis la komunvivon de gejoj kaj gejinoj. Kvankam pli kaj pli da pastoroj petas Dian benon por tia komunvivo, la kristandemokratoj (la Blanka Listo en la Civita Senato) estas nepre kontraŭaj. Laŭ la Blankanoj ankaŭ nekristanaj ne rajtas gejedziĝi: gejinoj ne rajtas gejedziniĝi...

Permesu al mi enmeti ĉi tie lingvan rimarkon. Esperanto ne havas, kiel naciaj lingvoj, unu vorton por geedziĝi, gejedziĝi kaj gejedziniĝi. "Mariagi" forprenus la akcenton de samseksemeco. Petro mariaĝas kun Paŭlo, Petra kun Paŭla, Petro kun Petra (kompreneble ni tamen povas plu diri: Petro kaj Petra geedziĝas). La pli multaj ŝtatoj malpermesas al samseksemuloj mariaĝi. En Belgio, Hispanio kaj Nederlando ĉiuj civitanoj seneŝcepte povas mariaĝi.

Neologismojn oni devas enkonduki nur en okazo de vera bezono. "Mariagi" ni bezonas por neapartigi gejojn kaj gejinojn kaj eble ankaŭ por traduki en esperanton la Eŭropan Konstitucion. ☞

spikume



Kuvajto. La 17^a de majo 2009 estas historia tago por la virinoj en Kuvajto. Unuafoje en tiu lando, kvar (jes, kvar!) virinoj estis elektitaj al la nacia Parlamento, Maylis al-Umma. En la riĉa islama emirejo la virinoj konkuris en 2005 la rajton voĉdoni kaj eĉ kandidati, sed nek ĉe la voĉdonoj de 2006 nek ĉe tiuj de 2008 iu el ili estis elektita.

Ĉi-foje la "vualita armeo" pli ol antaŭe bone kaj intense laboris. Virinoj estas 57% de la voĉrajta loĝantaro: ili proponis dek ses kandidatinon por atingi almenaŭ unu el la 50 parlamentaj seĝoj, kaj kompakte voĉdonis, male al la antaŭa konsultigo, kiam nur 30% de la voĉrajtaj inoj prezentigis, tial ebligante al la tradicia socio daŭrigi la bojkoton al la virina reprezentado en politiko. Ili profitis la konflikton inter la Parlamento kaj la daŭra povo de la emiro, kiu pro kontrastoj kun ministroj decidis (kiel laŭleĝe li rajtas, ĉar Kuvajto, kvankam demokrata, plu estas hereda monarkio) eksigi la Parlamenton kaj kunvoki novajn balotojn, nur unu jaron post la antaŭaj.

Unu el la elektitaj virinoj, Massuma al-Mubarak, estis jam ministro pri Sano en la antaŭa leĝperiodo (2005). La kvardekjara profesorino pri filozofio kaj politikaj sciencoj, Aseel al-Awadhi, volas labori en la parlamento pri sano, edukado kaj virinaj rajtoj. Oni ankoraŭ ne konas la preferojn de la du aliaj elektitinoj, la feministino Rola Dashti kaj la profesorino pri pedagogio Salwa al-Jassar. Ĉiel, ne mankas al ili elano: *Femina* gratulas kaj bondeziras!

Hejma instruado: ĉu rekomendinde?

Mi ŝatus formi esperanto-familion, kaj mi volus mem instrui al miaj infanoj ĉion en esperanto. Kion vi opinias? Ĉu ekzistas spertoj de "Home Schooling" en Esperantio?

Paola, 28-jara, Italio

Klara respondas al legantinoj

La hejma instruado dependas unuavice de la sociaj moroj kaj de la ŝtataj leĝoj en la lando kie ĝi okazas. Mi timas ke en Italio la afero ne estos facila, eĉ ne en la itala Esperantio. Ĉu vi scias ke la tiea patriarko d-ro Renato Corsetti publike sin esprimis plurfoje kontraŭ hejma instruado, kvankam li mem esperantista patro? Lia sinteno ŝajnas rekte influita de certa "etburĝeca" itala maldekstro, laŭ kiu la hejma instruado estus nur afero de riĉuloj, aŭ ke ofte ĝin elektus alternativuloj, kiuj preferus vivi tre simple per memfarado de manĝaĵo, vestaĵoj ktp, anstataŭ labori kontraŭ mono por aĉeti varojn... Kaj similaj antaŭjuĝoj.

Evidente ekzistas ankaŭ tiaj familioj, sed ekzemple tio ne estas la kazo de Angela Tellier kaj ŝia edzo en Britio: ili neniam estis riĉuloj, kaj konatoj iliaj kiuj same edukis la infanojn hejme ankaŭ ne estas. Krome ŝia edzo laboras, ŝi laboras, la infanoj laboras. Iliaj gefiloj estas sociemaj kaj "ordinaraj", laŭ la opinio de ĉiu kiu renkontis ilin en Esperantio.

Rimarku ke Angela Tellier enkondukis esperanton nur en dua momento, startante el la brita situacio. Unu el ŝiaj ĉefaj motivoj por eduki la infanojn hejme estis, ke laŭ ŝi en Britio oni havas ne tre "mondecan" vidpunkton. *La aroganteco kaj fiereco de la britoj pri sia nekaptablaj lerni lingvojn kaj pri la nenecese lerni alies lingvon estas nekredeblaj*, ŝi deklaris publike. Ŝi deziris, ke ŝiaj infanoj havu "mondecan" vidpunkton. Tial la tuta familio (kvin personoj) lernis la francan, la germanan, la latinan, eĉ iom la japanan, kaj ankaŭ esperanton.

Antaŭ ol entrepreni hejman instruadon, via celo estu klara. La celo de Angela Tellier ĉiam estis konduki siajn infanojn al memedukado, kaj tion ŝi faris precipe per laŭlegado kaj konversacio. Ŝi celis kuraĝigi sendependecon, respondecon kaj scivolemon en la lernado. Ŝi klare distingas inter edukado kaj instruado: la unua estas dumviva afero, sed la instruado fare de iu alia nur dumtempo (en Britio laŭleĝe inter la kvina kaj la deksesma aĝjaro).

Inter la antaŭjuĝoj kontraŭ hejma instruado ne mankas tiu de prof. Duncan Charters, kiu dubas ĉu vere eblas lerni hejme fremdajn lingvojn sen instruisto kun iom da kono tiurilata. Malkonsente pri tio, laŭ Angela Tellier la fremdlingva lernado dependas unuavice de la bonvolo, kaj duaŭvice de la nivelo celata. Mi mem, cetere, ne scias vere, kio estas sukceso en la lernado de fremda lingvo.

Kara Paola, mi ne volus senkuragiĝi vin. Por pli da subteno rilate al hejma instruado bonvolu kontakti la medion kiu plej skeptikas pri la deviga instruado de nia lingvo en publika lernejo, nome la Esperantan Civiton, tra www.esperantio.net Bondezirojn!



Familio Minnaja: ne facile imitebla modelo

de Carlo Minnaja

rememoroj
okaze de la
Internacia Tago
de la Familio
2009

Dum mia lasta en-utera vespero venis eksterlanda esperantisto al mia familio en Romo, tiam konsistanta el miaj gepatroj Luigi kaj Carolina kaj mia frato Nicola; post plezura interparolo, li fiksis rendevuon en Placo Sankta Petro kun la triopo por la morgaŭa posttagmezo. Mia patrino lin atentigis, ke ne certus ŝia ĉeesto pro la fizika stato lige al akuŝo supozata tre baldaŭa. Efektive la postan matenon, la 19^{ma} de marto 1940^a, je la 11^a horo, mi envenis la mondon; al la rendevuo iris nur mia patro kaj frato: ĉi lasta, per mia naskiĝo, ne plu havis la ĝustiaman rekordon esti la plej juna denaska esperantisto.

Mia familio estis plene esperantista: miaj gepatroj interkonatiĝis en 1933 okaze de vizito de mia patro el Romo al la grupo de Venecio, kie mia patrino elstaris jam de jardeko; ili kunlaboris por la traduko de la *Gvidlibro pri Romo kaj ĉirkaŭaĵoj* disdonota al la partoprenontoj de la UK en Romo en 1935 (mia patro estis sekretario de la LKK); ili geedziĝis en 1937. La decido fari el siaj idoj denaskajn esperantistojn estis absolute senhezita, kaj la aplikata metodo estis laŭtempa: dum kelkaj horoj ili parolis al ni infanoj en la itala, dum kelkaj aliaj en esperanto. Mi ne memoras tiun sistemon asertitan de miaj gepatroj kiel fiksan (eble ĝi daŭris nur ĝis mia demamiĝo), sed certe ni ĉiuj interparolis senĝene ambauilingve: ĉe alveno (ege ofta)

de gastoj esperantistaj ni parolis inter-nacilingve ankaŭ inter ni. *Heroldo* aperigis foton de mia frato dujara dum li legas la gazeton (li jam, mirinfane, kapablis legi ambauilingve je tiu aĝo; mi pli poste, sed certe longe antaŭ la lerneja aĝo). La grandega sindediĉo de miaj gepatroj, precipe de mia patrino, al ni infanoj kaj al nia entrempiĝo en la esperantistan kulturon estas la ĉefa kaŭzo de niaj postaj sukcesoj kaj la neanstatebla donaco kiun tiu eksterordinara paro lasis al ni.

El la milita tempo mi memoras multon: la helpon al sinkaŝo de esperantistaj hebreej kaj la vizitojn de novzelandaj soldato kaj de brita oficiro, tiam dumtempe haltantaj en Romo dum la avanco norden de la aliancanaj armeoj retropuŝantaj la germanajn laŭ la itala duoninsulo. Repensante pri ili mi memoras atmosferon kore samideanan sen ajna atento al ilia uniformo, kvankam en mia familio restis ĉiam, ankaŭ postmilite, la ideo ke miaj aliancanoj estis la germanoj kaj ke Usono, Britujo, Francujo, Nov-Zelando ktp. estis la malamikoj. La britan oficiron mi ekkonis la 10^{ma} de julio 1944, kiam li vizitis mian hejmon en Romo. Tiam mi estis kvarjara; mia frato, tiam sesjara, poste diris, ke tiun renkonton li ĉiam memoros, ĉar per ĝi li komprenis, ke esperanto vere detruas la barojn inter la popoloj intermilitantaj. Ĝuste antaŭ kelkaj monatoj, foliumante kantareton, li rimarkis, ke tiu brita oficiro, Douglas Murphy, estas la aŭtoro de kanto *Esperanto estas la lingvo por ni*.

Ĉe la fino de la milito verve rekomenciĝis la esperantista vivo en Romo, kaj la unua eldonaĵo, jam en 1945, estis sinteza gramatiko verkita de mia patro, kun ankaŭ literatura parto: modeste mimeo-



grafitaj fascikloj kuntenataj de griza papera dosierujo, sed estis la restarto. Ni tuj partoprenis la unuan postmilitan nacion kongreson en Torino en 1947, kie mi, sepjarulo, aliris la podion por porti la saluton de iu stenografia instituto freŝe fondita en Romo; en tiu instituto oni instruis novan stenografon, kiu estis ankaŭ adaptita al esperanto. Grandajn gratulojn mi ricevis kiel denaska esperantisto, kvazaŭ la merito estus mia!...

Gastoj daŭre estis akceptataj en mian hejmon: estis la tempo, kiam forkuris el komunismo multaj samideanoj el Orient-eŭropo kaj ili trovis ĉe mia familio helpon kaj pacan atmosferon. Kelkaj migris al Nov-Zelando, aliaj al Kanado, aliaj al Usono, kaj ni renkontiĝos post pluraj jaroj en iuj UKoj.


Plurajn poeziaĵojn ni lernis parkere sub gvido de mia patrino: mia frato kaj mi dialogis deklamante *Rozujo sovaĝa, simbolo de l'amo*" pikante al ni la manojn laŭ la teksto. Mi daŭre havas la opinion, ke la kanto plej frue de mi lernita estis *La espero*; eble tio estas signo de maljuneco, sed ankoraŭ nun mi kortuŝiĝas ĉe ĝia aŭdado. Esperanto donis okazon ankaŭ al humorajoj. Ĉe la Baghya poememo *Estas mi esperantisto*" mi estis vere konvinkita, ke *kuŝas ie sub tegmento / netuŝebla Fundamento*, kaj mia patrino daŭre diradis, ke se falas la Fundamento falas ĉio; tial mi efektive iris sub la tegmenton serĉe al ĉi aĵo, kiun mi opiniis subtena ŝtono. En tiu tempo, okaze de la Kristnaskaj festoj, ĉiujare estis aranĝata publika deklamado de diverslingvaj poemoj antaŭ ligna statuo de infano Jesuo en iu preĝejo en Romo; rolis pluraj infanoj, ĝenerale de familioj de diplomatoj ĉe Vatikano; mi regule partoprenis per esperanto, ĝis la aĝo tion ne plu ebligis.

Kiam en 1950 rekomenciĝis la esperanto-dissendoj ĉe Radio Roma, startintaj en 1935 kaj ĉesintaj en 1942, mia familio estis tuj engaĝita. Je la fina mardo de ĉiu monato ni sursceniĝis *Pinokjon* en la traduko de Mirza Marchesi: mia frato rolis la rakontiston, mi Pinokjon, mia patrino la lazurharan feinson kaj mia patro aliajn virajn voĉojn. La dissendo iĝis populara; eĉ, mi ricevis karton adresitan al "Pinokjo, Radio Roma, Esperantofako"....

En 1951* komenciĝis la sezono de la UKoj, al kiuj miaj gepatroj nin kunpor-

tis dum pluraj jaroj. Eĉ se ni ne plu kutimis paroli Esperanton inter ni en la normala vivo, tamen dum vojaĝoj ĉe la transpaso de la landlimoj ni tuj ŝaltis al esperanto principe. En la kongresoj mi ekkonis aliajn denaskulojn, pri kiuj mi estis scivola, ĉar en iu tiutempa UEA-jarlibro estis listo de denaskuloj, nur dudek. En Munkeno (1951) mi kruciĝis dum momento kun etulo Moravec, en Oslo (1952) mi ludis kun gefratoj Anjer (kun Birgita mi havis intervjuon ĉe la norvega radio); en posta okazo mi nur de malproksime intervidiĝis kun la blondegaj fratinoj Koopmans, nur poste mi konsciĝis pri la denasko de gejunuloj Weide, Simonnet, Paponiĉ. La infanjaj kongresetoj kaj renkontiĝoj de esperantistaj familioj enmodiĝis kiam mi estis jam preteraĝa. Multe pli aĝa ol mi estis la (laŭdire) unua denaskulino, la filino de Montagu Butler, sed kiam ŝi vizitis mian familion ŝi apenaŭ plu sukcesis paroli la lingvon, pro longega nepraktikado.

Ni rolis kiel unu tuto, kaj kiel tuto familio Minnaja komencis esti konata en la movado, kvankam ĉiu havis siajn specialaĵojn. Mia patrino neniam aperis surestrade, sed ŝia postkulisia reĝisorado de la tuta kvaropo estis klare perceptebla. Intersajn spertojn portis ankaŭ la engaĝiĝo



de mia frato Nicola [ĉ. deksepjara en la foto, kun dek kvinjara Carlo] en la estraro de TEJO. Sekretario ekde 1955 li forte favoris en la junularo la Fighiera-Lapenna teorion de la kunigo de ĉiuj junulaj fortoj kiel sekcio de UEA. Poste, kvazaŭ stafete, ankaŭ mi iĝis estrarano de TEJO...

Se la familio ne plu estis kuna en la ĉiutageco post la iro de mia frato al la universitato en Pisa en 1956, ĝi tamen havis ielan plilongiĝon, ĉar en ĝia medio, precipe kun la varto de mia patrijo, kreskis la esperantisteco de Antonio De Salvo kaj Mauro La Torre, du jarojn pli junaj ol mi (kaj iom pli poste aliĝis Renato Corsetti). Tamen en 1957 mia frato subite proponis-trudis ŝanĝon de la familaj lingvaj kutimoj. Fascinite de la Frostavallen-principaro inspirita de Lapenna, li decidis aliĝi al la principo, ke kiam du esperantistoj estas kune ilia lingvo estas esperanto. Ekde tiam tiu principo diktis la interparolojn de ni ĉiuj: ni parolis inter ni nur en esperanto, kaj miaj gepatroj, ankaŭ kiam ni filoj ne plu vivis ĉe ili, daŭrigis inter si la striktan fidelecon al tiu principo. Ankoraŭ en la lastaj tagoj de sia vivo mia patrino parolis la italan kun la flegistino, la venecian dialekton kun sia fratino kaj esperanton kun ni filoj.

Kun la forpaso de ambaŭ niaj karmemoraj gepatroj familio Minnaja kiel tia finiĝis, sed la lingvo de l' espero estas ankoraŭ hodiaŭ la normala, ordinara komunikilo inter mia frato kaj mi.

La familio de Anto Speri: ĉu aŭtente esperanta?

de Perla Martinelli

*La unua literaturaĵo
kiu traktas la socian rolon
de esperanto-familioj
estas la dramo*

*"La familio de Anto Speri"
de Giorgio Silfer, verkita
en 2003 kaj surscenigita
en la sama jaro dufoje,
fare de Torina Nova Trupo
kun Jordan Todorov reĝisoro.
Vikipedio*

La familio de Anto Speri
tri aktoj de Giorgio Silfer



Ĉaŭdefono, 14an de julio 2003
76^a esperanto-kongreso de SAT

*Unu el la verkoj kiuj plej
impresis min el la originalaj
verkoj en esperanto estas
"La familio de Anto Speri"
de Giorgio Silfer. Ĝia temo
ne estas nur pri la identeco
de esperantistoj, sed ankaŭ
grava demando pri la rilato
inter generacioj kaj geozoj.
Certe ĝi estas teatra majstrojo.
Philipp (Britio)
en Lernu!*

Kio estas esperanta familio? Giorgio Silfer donis sian respondon per dramo, kies mondan premieron ni spektis en Ĉaŭdefono, la 14^{an} de julio 2003.

En *La familio de Anto Speri* esperanto rolas transnacie, pli ol internacie. Nome, ambaŭ gepatroj apartenas al la sama mezeŭropa etno, tiel ke la infanoj iĝis dulingvuloj laŭ la metodo priskribita de Lambert: unu parenco, unu idiomo. En ĉi tiu kazo la etna (aŭdebla en la dramo kelkfoje; sed reale temas pri Volapük!) estas la patrino, dum esperanto la patro.

Do la unuaj du karakterizoj por la esperanta familio, laŭ la aŭtoro de la dramo, estas transnacieco (pli ol internacieco) kaj lernado el la patro. La internacieco Silfer perceptas kiel efikan ne tiom el internacia gepatra paro mem, kiom el la ĉirkaŭa amikaro (en ĉi tiu kazo precipe "onklo" Bruno, la okcidenteŭropano, eble franco, kiu iĝis la amanto de Klara, la edzino de Anto Speri). Interesa estas ankaŭ la intuicio, ke la infano akceptas esperanton paralele al la akcepto de la patra figuro, kaj laŭ Silfer (inspire de Pierre Bovet) tio kondiĉas ankaŭ la kredon je Dio. Sekve, en la fokuso de la esperanta familio estas demando de identeco: demando pli facile respondebla, sen la interkulturaj problemoj neeviteblaj ĉe internacia paro.

En la familio de Anto Speri ne estas plii ol du generacioj: gepatroj kaj gefiloj. Mankas geavoj, mankas genepoj. Efektive esperanta familio tre malofte estas plurgeneracia: esperantisto je la tria (aŭ eĉ kvara) generacio de la sama familio ja ekzistas, sed raras.

Alia grava detalo estas la simetrio inter la du generacioj: la aĝaj estas tri, la tre junaj estas kvar. Per tio la aŭtoro priskribas familion de nia tempo, kun la rimarkinda multigo de denaskuloj en la 1970^a

kaj 1980^a – nur meze de la 1990^a ni speras la fenomenon de relative nombra aro da denaskuloj, kiuj serĉas unu la alian.

Ĉi tiu fenomeno respondas al la vero, same kiel veras ke la esperantaj familioj estas plej multaj en la danuba areo, ĉiukaze en mezorienta Eŭropo. La politika, socia, historia evoluo de tiu areo certe influas ankaŭ la vivon de tiuj familioj.

La dramo perceptas la fragilecon de tia situacio: Anto Speri sukcesis firmigi la esperantistecon de la tuta familia vivo, sed liaj amikoj (en Galegio kaj en najbara lando) ne sukcesis.

La esperanto-movado ne aperas en la dramo. Efektive ofte la familio estas iom izolita en la tradicia movado. Kion faras la movado por subteni la familiojn? Preskaŭ nenion, fakte. Pri hejma instruado ĝi ne okupiĝas; la internacia infankongresito apud UK estas malpli grava ol REF (Renkontigo de Esperanto-Familioj) aŭ PSI (Paska Semajno Internacia). Kaj la iniciato Rondo Familia, kadre de UEA, ne sukcesas konstante produkti fakan gazeton: *Familia Esperanto* paŭzis en 2005-2006, kaj ree paŭzas ekde 2008.

Interesan sperton vi havus, se vi atingus Tromson, unu el la plej nordaj urboj en Eŭropo. La lokaj esperantistoj agrable vin akceptos, kaj vi tuj rimarkos du tipojn: la flue parolantajjn, kiuj apartenas al tri familioj (du internaciaj, unu ne) kun infanoj, sume dekduo da personoj; kaj la timidaj norvegoj, kiuj apenaŭ kuraĝas baldaŭ en esperanto.

Anto Speri havas familion *sui generis*, kiu certe ne plaĉas al zelotaj supozantaj, ke la esperanto-familio devus esti modela nukleo, same kiel esperanto estas modela lingvo. Sed Anto Speri situas pli proksime al la aŭtenta realo nuntempa, ke tio plaĉu aŭ ne.

Kvin spektintoj libere babilis inter si post la itala premiero de La familio de Anto Speri. Levigis diversaj demandoj por Giorgio Silfer, la aŭtoro. Armando, kiu ne nur spektis sed ankaŭ legis la teatraĵon, suspektas ke vi, la aŭtoro, per ĝi kampanjas por raŭmismo. Ĉu vere?

La familio de Anto Speri ne ekzistas, sed ekzistas la atmosfero kaj la cirkonstancoj, en Eŭropo ie ĉe la Danubo ie, kiuj produktus ĝin. Efektive ekzistas homo, kia la amiko de Anto, rifuzinta paroli al sia filino dum dudek jaroj en alia lingvo ol esperanto, krom unu fojo, kiam la loĝejo estis trafita de incendio. Efektive ekzistas homoj, kiaj Anto mem, tipa mezlerneja instruisto (kaj esperantisto) en la ruinanta marksisma sistemo. Efektive ekzistas esperantistidoj kiaj Liza, Saŝo, Olga. Efektive ekzistas ĉiuj personoj, sed la fikcio remiksas ilin, kvazaŭ kartojn en kartaro. Kaj aperas unika ludo, kie la esperanto-socio estas esenca atuto. Certe, la dramo priskribas tiun socion per la okuloj de raŭmismo, sed ne kampanjas por ĝi. Kiu perceptas tiel, tiu do opinias ke ankaŭ la teatro de Dario Fo aŭ de Bertoldt Brecht kampanjas por komunismo: tro primitiva percepto...

Luciano opinias ke la tuta dramo meritas pliajn konsiderojn post atenta relego kaj reaŭskultado, eventuale elkasede. Tiam estus pli facile kompreni la feliĉon de la protagonisto, Anto Speri, kiu ĝojas ĉar la tre amatan edzinon Klara feliĉigas amanto, Bruno, kiu mem estas amiko de Anto, kaj kvazaŭ onklo por la filinoj.

Temas pri triopo multe pli respektinda ol tiu kiun vi renkontas en okcidenta vodevilo. La koncepto de jaluzo estas reportita al sia origina etimologio. Se A vere amas C, kiu amas B, certe A ekamos ankaŭ B. Anto Speri realigas la ekvilibron de larĝigita familio. En tio li estas la plej saĝa el ĉiuj. Pli saĝa ol sia edzino Klara, kiu en la fino ekdubas pri sia rolo en la ŝanĝitaj cirkonstancoj. Pli saĝa ol la okcidenteŭropa amiko, kiu serĉas manieron por dekroĉi sin, kiam la konjunkturo ŝanĝiĝas kaj ne povas plu funkcii la moro havi duan familion trans la "Fera Kurteno", praktikata de okcidentaj (ne)esperantistoj dum la 1980^a jaroj. La Esperanto de la 1930^a instituciigis la kongresedzinon, tiu de la 1980^a legitimis la transkurtenedzinon. La aŭtoro nur priskribas la morojn de siaj samtempuloj. Cetere li havas fortajn referencojn: vidu verkon de Sándor Márai.

Johano konfirmas, ke li povus rekonii plurajn eŭropajn esperantistojn en La familio de Anto Speri – certe ĉiujn infanojn aŭ gefilojn, certe ankaŭ Anton Speri kaj s-ron Löw. Sed li ne rekonas iun en Klara, kaj precipe ne en Bruno: li neniam renkontis tian entrepreniston inter la okcidentaj esperantistoj, aŭ tiel karaktere interesan virinon inter la orientaj, dum Universala Kongreso.

Nia tuta junularo retroviĝas en internaciaj seminarioj, festivaloj, kongresoj: kaj la interesaj kaj la malpli interesaj. Kontraŭe, la plejmulton el la interesaj homoj vi ne renkontas en kongresoj de plenkreskuloj. Certe Klara neniam irus al Universala Kongreso: ŝi ne povus,

La familio de Anto Speri tri aktoj de Giorgio Silfer



Rimino, 30^{an} de aŭgusto 2003

interalie pro la familia ŝarĝo. Kaj ankaŭ Bruno dizertas ilin: li estas en aĝo profesie tro aktiva por permesi al si tutsemajnan kongreson. Do estas normale, ke Johano ne rekonas konatojn en Klara Speri aŭ en Bruno Banfi.

Al Roberto multe plaĉis la dialogo inter la du filinoj (Liza kaj Eva) kaj la patro, pri la vorto Dio. Li trovas ĝin profunde kristana, kaj krome tre humura, pro la specifa humuro de Anto Speri.

Roberto tuŝas gravan punkton. Liza kaj des pli Eva amas sian patron, kaj tra la patro ŝatas esperanton, ĉar la lingvo devigis lin esti ĉitutage proksima al ili, aparteni plene al ili dum la infanaĝo. Tio ne okazis por Saŝo, kaj des malpli por Olga: tial ili duone aŭ tute malŝatas nian lingvon. Sed tra la figuro de la patro la infano perceptas ankaŭ la figuron de Dio. Estas ia triptiko patro-lingvo-dio kiu niaj denaskuloj akceptas – aŭ rifuzas. Ĉu tio estas profunde kristana? Almenaŭ ĝi estas profunde homa: la patra figuro estas grava, kaj la lingvo, per kiu li volas esti identigita ĉe la gefiloj, havas sencon nur se ĝi igas des pli aminda tiun patran figuron.

Kiel vi mem priskribus vian dramon, kompare kun la antaŭaj, en tridek jaroj da teatroverkhado? – demandas Petro.

La familio de Anto Speri estas prismo pli multifaceta ol Triptiko aŭ La vorta klaso aŭ Doktoro Rosales. Unu faceto spegulas la situacion de la 1990^a en orienta Eŭropo; dua la rilatojn inter gepatroj kaj gefiloj; tria la rilatojn ene de la nuna generacio de denaskuloj; kvara la rilatojn ene de la pli aĝa generacio; kvina la evoluo de la (esperanto-)socio entute; sesa la signifon de amo kaj amikeco. Ĉi tiu dramo estas pli granda novaĵo el socia vidpunkto, ol kiel kontribuo al avangarda teatro en nia lingvo: tiurilate La vorta klaso markis pli gravan etapon. Min mem surprizas la optimismo de La familio, kompare kun pli fruaj dramoj, pli amaraj, eĉ foje senesperaj. Eble la fondo kaj ekspansio de la Esperanta Civito donas (al mi kaj al pluraj) multe pli da elano kaj espero, post la 1990^a. [el La Ondo de Esperanto. 2004:3 (113)]

Kompaso pretas por beletra orientiĝo

Havi kvar kardinalajn punktojn ene de kiuj libere moviĝi, havi komunan kompanion sed individuajn vojojn. Tia estas la plej interesa rezulto de la ateliero pri beletra kreivo, okazinta en Ĉaŭdeĥono danke al la partnereco de Kultura Centro Esperantista kaj Feminisma Esperanta Movado, tuj post Pasko 2009.

La ateliero, preparita per telematika kurso, involvis sep FEM-anojn el ses landoj: Anjo Amika, Marie-France Conde Rey, Agneta Emanuelsson, Judit Felszeghy, Ivanička Maĝarova,

**Estetiko
ne havas la rajton
koincidi kun kosmetiko
nek la devon koincidi
kun etiko.**

Anjo Amika: La ateliero donis al mi interesajn taskojn por evolui. Mi aktivis pri muzikaj tekstoj. Tamen mi ne ekskludas la verkadon de alio ol kanzonoj.

Marie-France Conde Rey: Ni laboris laŭ kvar kardinalaj punktoj. Estis utile kaj interese. Mi planas publikigi dulingvan libron, france-esperante.

Etel Zavadlav: Estis interesa procezo kiel ni laboris ĉiuj kune por akiri scion. Ĉi-foje mi havis plezuron esti en iu grupo. Pri publikigo? Mi havas kolekton kiu jam pretas.

Intenco estas ke la skolo fondita laŭ provizora nomo "Grupo de kompasoj" daŭre kresku nombre kaj kvalite.

Komenca incito (ateliero unusemajna) havis spertan kaj lertan gvidan-

Chamberline Nguejack Zedong, Etel Zavadlav; aldoniĝis plia FEM-ano, poeto Jarlo Martelmonto. La kurso, sub la gvido de Giorgio Silfer, strukturigis en komunaj horoj matene kaj indivi-

**Lingvo por verko,
ne verko por lingvo;
lingvo por literatura ĝeno,
ne literatura ĝeno por lingvo;
lingvo por homo,
ne homo por lingvo.**



**Verkistino estas
integra parto de la socio,
ŝi ne verkas nur por si mem.
Konsciante ke en la socio estas
konfliktaj, nin interesas aparte tiuj,
kiuj envolvas la rolon de la virinoj,
inkluzive de tiuj kiuj montras
interkulturajn demandojn.
La esperanta socio ne
koincidas aŭtomate
kun organizado.**

ton, kiu havas kion por diri, kaj scias kiel tion diri. De kiu eblas lerni multon. Kaj jes – por konkreta kreiva

dua kreado posttagmeze. *Vespere, la kinoteko de KCE prezentis filmojn kiel La bildfaristo (Svedio), Akvo (Hindio), Belegulinoj (Italio), kiuj plene kongruas kun la temaro traktata en la preparkuro.*

Per sia "kompaso" la atelieranoj difinis kvar fundamentajn rilatojn: al Nia lingvo (Nordo), al la Vero (W, okcidento), al Eros (E, oriento), al la Socio (Sudo). Estas ankoraŭ frue por paroli pri fondo de literatura skolo, sed probable nashigos io ĝis nun ne konata en Esperantio: verkistina rondo.

**Por la verkisto
sekso estas nek tabua
nek evitebla nek deviga.
Tra la sentesprimoj realigi
niajn diferencojn en
egalrajteco. Ĉiukaze
erotiko nepre enhavu
inteligenton.**

Judit Felszeghy: Tiu beletra ateliero estis granda ĝuo. Al mi plaĉis lerni kune kaj krei tian impulson. Pri la sekvo, mi ankoraŭ ne tute planis.

verkado necesas havi certajn koordinatojn. Kiuj ne devigas teni la saman raŭton kun la aliaj, sed estas necesaj por ne perdiĝi en la arbaro.

Ĉu estonte ni havos bonŝancon havi gvidadon flanke de la sama intelektulo, mi ne scias. Ni daŭrigos kun ekzercado kaj verkado, lernado de la lingvo kiel specifa rimedo de esprimiĝo, esplorado de formo, celante progreson de virina literaturo esperantlingva. Fosi la sulkon – lasi la spuron. Per ina mano. ✎

Kun bona volo, sen brazila karna valo

Sur la kolora kovrilpaĝo staras "la finsgro de Dio", pinta granita monto preskaŭ 1.700 metrojn alta, en la ŝtato de Rio de Janeiro. La libro mem elstaras, kiel riĉa literatura atingo.

Unua rigardo al la enhavtabelo donas ideon pri la abundo. Antaŭparole, la redaktoro Sylla Chaves detaligas sian labormetodon. Troviĝas cent dek ok poemoj originale verkitaĵoj en esperanto, cent okdek naŭ elbraziligitaj, kolora mapo de Brazilo, kvin paĝoj da bildigitaj kulturaj utilaĵoj por kompreni aludojn en la poemoj, dek paĝoj da portretoj pri preskaŭ ĉiuj kontribuantoj, cent sepdek ok biografiaj notoj, kaj fine glosoj por helpi la nefakulojn kaj la fremdulojn. Krom la fotoj aperantaj sur lukse brila papero, la cetero de la libro estas presita sur kremkoloraj (ĉu mi rajtus diri vanilkoloraj?) paĝoj en komforte legeblaj litertipoj.

La redaktoro certigas, ke lian elekton gvidis la valoro de la poemoj, ne la famo aŭ la simpatio de la poetoj. Tial troviĝas granda variececo: de *kapitalisto ĝis senhejmulo*. Tamen aliaj kriterioj efikas: unu estas, ke ĉiu el la dudek sep brazilaj ŝtatoj estu prezentita, alia ke estu beleco kaj klopedoj por ekesto de pli bona mondo.

Oni tuj vidas, ke se la unua estas nepre objektiva, sed sen garanti pri valoro, la du aliaj enportas grandan subjektivecon. Mia persona malampleksa sperto pri Brazilo kaj ties lingvo gvidas min al la fakto ke tie gravas la deklamado kaj eĉ la kanto de poemoj. En tiu kolekto estas signitaj la kanteblaj pecoj, kaj troveblas vortoj de fame mondkonataj kanzonoj, kiel tiuj de Tom Jobim. Krom la muzikeco de la brazila elparolo, la ritmo de la lingvo ludas gravan rolon. Felice ankaŭ esperanto posedas tiun ritmecon, kiu, kvankam ne simila al la brazila, ebligas tre artan

laŭtigon. En la glosoj, ĉe la kapvorto *versfarado*, Chaves dediĉas tutan paĝon al komparoj kaj klarigoj, konsente kun Porto Carreiro Neto, kiu asertis: *Eksterlandaj poeziamantoj meritas konatiĝi kun la belsona laŭsilaba versfarado de la brazilanoj*.

Estas ankaŭ prave, ke la elekto ne limiĝis je vivantaj poetoj, sed ampleksas ankaŭ forpasintojn. Tamen iu malekvilibro aperas en la proporcio de verkoj. La redaktoro kontribuas persone per la triono de la tuta poemaro, t.e. dudek el la cent dek ok originalaĵoj, kaj naŭdek el la cent okdek naŭ tradukaĵoj, laŭ la franca (ĉu nur franca?) proverbo: "Plej bonan servon oni ricevas de si mem". Ĉu tio signifas, ke li estas la plej talenta esperantista poeto en Brazilo, kaj ankaŭ la plej lerta tradukisto? Aŭ eventuale, la plej produktiva el ĉiuj? Jen specimene en lia esperantigo unu *trobo*, la plej populara poezia metro en Brazilo, kvarversaja sepsilaba (sed tradukita kiel oksilaba):

*Vi por mi estas kompleto
ĉio, kion mi bezonas...*

eĉ iom da ĵaluzeto,

*ĉar eĉ tio por mi bonas. **


Nepras diri ke Chaves ne sin nomas redaktoro sed kunorganizanto. Helpis lin en tiu grandioza tasko Neide Barros Rêgo, sentema poetino kaj agrabla kantistino, kiu kontribuis per ses originalaj poemoj kaj dek ses tradukoj.

Bedaŭrinde mi konas nek la evoluon de la nuna brazila poezia arto, nek la tendencojn de la esperantista poezio en Brazilo, sed mi supozas, ke tiu ampleksa antologio reeĥas nur parton de la kompleta temo, kvazaŭ ne la tutan manon sed nur unu fingron. Ĉiukaze, tia, kia ĝi estas, ĝi utilis por enkonduko en la brazilan kulturon, en aktiva atendo de plibonigo de nia mondo.

recenzas
Marie-France
Conde Rey



* El "Trovas escolhidas" (Elektitaj troboj) de Osvaldo Pires de Holanda



La konsola brilo de lumo ne estingebila

de Henrik Schück,
tradukis Perla Martinelli



Ŝajne la laŭreatino de la literatura Nobel en 1926 ne faris dankparoladon, fakte en la kolekto de tiaj dokumentoj sine de la Nobel-instituto aperas nur la prezenta laŭdo farita de la prezidanto de la Nobel-Fondaĵo, Henrik Schück, okaze de la premio en dato 1927 12 10. Konante la tre fermitan karakteron de la verkistino oni povas serene akcepti tiun strangajon. Restas al ni pri tiu evento eta filmo, prezentanta ŝin kun la edzo sur la fono de la neĝa sveda vintro, kaj eĉ pli mallonga dokumento de la itala radio.

La Sveda Akademio asignis la Nobel-Premion 1926 al la itala aŭtoro Grazia Deledda.

Grazia Deledda naskiĝis en Nuoro, urbeton en Sardinio. Tie ŝi pasigis siajn infanecon kaj junecon, kaj el la ĉirkaŭa naturo kaj el la vivo de la popolo ŝi ricevis la impresojn, kiuj poste farigis la inspirfonto kaj la animo de ŝia literatura laboro.

El la fenestro de sia domo ŝi povis vidi la neforan monton Orthobene, kun ĝiaj mallumaj arbaroj kaj grizaj krutajoj enĉizitaj. Pli malproksime staris ĉeno da kalkoŝtonaj montoj, kiuj foje aspektis violkoloraj, aliffoje citronflavaj, ankoraŭ aliffoje malhelbluaj, laŭ la ludoj de la lumo. Kaj fone la neĝaj pintoj de Gennargentu.

Nuoro estis izolita el la cetero de la mondo. La multaj vizitantoj kutime alvenis ĉevalrajde, kun la virinoj sidantaj malantaŭ la viroj. La monotoneco de la ĉiutaga vivo estis interrompita nur de la tradiciaj festoj, religiaj aŭ popolaj, kaj de la kantoj kaj dancoj en la ĉefstrato dum karnavalo.

En tia atmosfero, la mondpercepto de Grazia Deledda ŝosis kiel io unike naŭva kaj primitiva. En Nuoro esti bandito ne estis rigardata kiel io hontinda. *Ĉu vi opinias, diras maljuna kamparanino en romano de Deledda, ke banditoj estas malbonuloj? Nu, vi eraras. Ili estas nur viroj bezonantaj montri siajn kapablojn, jen ĉio. En la antikvaj tempoj la viroj iris al milito. Nuntempe ne estas militoj, sed la viroj daŭre bezonas batali. Tial ili faras siajn rajdojn, siajn trudkaptojn, siajn ŝtelojn de brutaro, ne por fari ion malbonan sed nur por montri iamaniere sian lertecon kaj forton.*

Tial la bandito ofte ĝuas la simpatian de la popolo. Se li estas kaptita kaj enkarcerigita, la kamparanoj uzas esprimplanan dirmanieron, signifantan ke "li enfalis problemon". Kaj kiam li liberiĝas neniu lin markas negative. Fakte, kiam li revenas al sia hejmurbo li estas bonvenigata per la vortoj "Ke tiu problemo reaperu nur post cent jaroj!"

Vendetta estas plu kutima en Sardinio, kaj homo estas respektata se li repagas per ganta venĝo la murdon de familiano. Perfidu la venĝinton estas taksata krimo. Iu aŭtoro skribis: Eĉ se la premio por lia kapo estus trifoje pli granda, en la distrikto de Nuoro estus trovebla eĉ ne unu persono por lin perfidi. Nur unu leĝo valoras tie: respekto por la vira forto kaj malaprezo por la justico.

En tiu urbo, tiel malmulte influata de sia aparteno al Italio, Grazia Deledda maturiĝis, ĉirkaŭita de sovaĝe beleĝa naturo kaj de homoj kiuj posedis certan primitivan animgrandon, en hejmo kiu havis en si ian biblian simplecon. *Ni knabinoj*, ŝi skribas, *ne havis la permeson eliri el la domo krom por iri al la meso aŭ por esceptakaza promeno en la kamparo*. Ŝi ne havis la eblecon atingi altan edukstupon, ĉar kiel la aliaj mezklasaj infanoj en tiu regiono ŝi frekventis nur la bazan lernejon. Pli poste ŝi povis ricevi kelkajn privatajn lecionojn pri franca kaj itala lingvoj, ĉar ĉar ĉar ŝia familio parolis nur la sardan. Sekve ŝia edukado ne estis tre vasta. Tamen, ŝi tre bone konis kaj ŝategis la popolmuzikon de sia urbo, kun la

himnoj laŭde al sanktuloj, la baladoj, la lulkantoj. Kaj estis al ŝi intime konataj ankaŭ la legendoj kaj la tradicioj de Nuoro. Krome, ŝi povis hejme legi iajn ĉefverkojn de la itala literaturo kaj kelkajn tradukitajn romanojn, ĉar laŭ la sardaj parametroj ŝia familio estis sufiĉe bona-tata. Sed tio estis la tuto.

Tamen la knabino trege ŝatis studi kaj, nur dektrijara, ŝi verkis ekstravagancan sed tragikan novelon, *Sarda sango* (1888), kiun ŝi sukcesis publikigi en roma periodaĵo. La nuoranoj tute ne ŝatis tiun elmontron de aŭdacco, ĉar ili estis konvinkitaj ke la virinoj devas okupiĝi pri nenio krom la hejmaj devoj. Sed Grazia Deledda ne konformiĝis al tio kaj dediĉis sin tute al la verkado de romanoj: unue,

Dek unu virinoj gajnis la literaturan Nobelon. Inter la unua kaj la dua pasis dek sep jaroj.

Grazia Deledda naskiĝis la 27^{ma} de septembro 1871 el Giovanni Antonio Deledda kaj Francesca Cambosu, kiel kvina inter sep gefratoj. La familio apartenas al la bonstata burĝaro, la patro diplomigis kiel leĝa prokuroro kaj komercis pri karbo. Ambaŭ gepatroj estis striktaj kaj severmoraj katolikoj.

Grazia mem asertas ke nur dektrijara ŝi verkis jam publikigindan rakonton, laŭ instigo de privata instruisto kiu iel kompletigis ŝian nur bazlernejan studkarieron. Efektive, ne longe poste ŝi sukcesis publikigi en tiam fama virina revuo la unuan novelon, *Sarda sango*, kiu malfermis por ŝi la pordojn de regula kunlaborado al diversaj periodaĵoj. *La tuta Nuoro klaĉis kontraŭ mi*, ŝi poste rakontos, *oni diris ke mi misvojiĝis, ke mi hontigas mian landon; mi ricevis anonimajn leterojn, oni min longtempe persekutis... sed mi kaŝe persistis*.

Baldaŭ ŝi dediĉis sin precipe al verkado de romanoj, kaj en 1892 aperas *Sardia floro*, unua de tre longa serio. Tre influata de "felietonaj" verkistoj kiel Sue, Dumas, Invernizio, sed poste de Tolstoj kaj aliaj rusoj, unuavice Dostojevskij, ŝi iom post iom ellaboris propran stilon, komence sufiĉe krudan ankaŭ pro la malfacilo verki en la itala, dum ŝia gepatra lingvo estis la sarda. Tial la kritiko estis al ŝi severa, akuzante ŝin ankaŭ pri malfrua romantismo, sed la publiko tre ŝatis ŝiajn atmosferojn, pasiajn kaj perturbajn. Ekde *Elias Portolu*, aperinta en 1900, ŝi komencis esti aprezata kiel akrokula observanto de la naturo ŝin ĉirkaŭanta kaj de la sardaj tradicioj; krome ŝia stilo glatiĝis, ĉiam pli atenta kaj matura estis ŝia psikologia enprofundiĝo en la personojn kiujn ŝi vivigis. En tiu romano, helpe de lingvo pura kaj sugestia, arigas la plej karakterizaj temoj de ŝia prozo: la sardia pejzaĝo, la kompleksa morala problemato de kulpa amo, la spirita malsano kiu korodas ankaŭ la korpon, la dekadenco de la grandaj familioj kiuj fosiliĝas ene de siaj ruinantaj palacoj; ĉio sur la barbara fono de la popolaj religiaj festoj de ŝia insulo, inter sango kaj mistikismo, malamo kaj heroa sinofero. Same altan nivelon ŝi atingos en kelkaj sekvaj romanoj, kiel *Kanoj en la vento*, *Marianna Sirca*, *La patrino*, kaj precipe *Cindro*, publikigita kvar jarojn poste.

Intertempe ŝi okupiĝis ankaŭ pri etnologio kaj pri belarto, ĉiam pli larĝigante sian intelektan horizonton, danke al fidelaj amikoj kiuj ŝin stimulis. Dum restado en Cagliari, la sardia ĉefurbo, ŝi renkontis Palmiro Madesani, ministerian funkciulon. En la sekva jaro, la 11^{ma} de januaro 1900, ili geedziĝis kaj ekloĝis en Romo, kie ŝi restados ĝismorte. Kvankam ĉiam retirigema kaj kontraŭa al mondumado, en la itala ĉefurbo ŝi konatiĝis kun la protagonistoj de la tiutempa itala kulturo.

La 3^{ma} de decembro naskiĝis sia unua filo, Sardus, kiun poste sekvos alia filo, Franz. Grazia Deledda dividis sian tempon inter la verkado kaj la familio, produktante meze unu verkon jare. En septembro 1926 la Sveda Akademio asignis al ŝi la literaturan Nobel-Premion, kiun ŝi ricevis "sen eĉ ununura rideto".

Frapite de kancero, ŝi mortis dek jarojn poste, la 15^{ma} de aŭgusto 1936. Aŭtobiografia romanon kiun ŝi ne povis kompletigi aperis en la sekva jaro, zorgo de la fama eseisto Antonio Baldini: *Cosima*, preskaŭ *Grazia*.

Se via filo verkas poemojn, batu lin. Se li insistas, sendu lin labori sur la monton. Se malgraŭ ĉio li persistas, lumigu por li lampon, ĉar li estas poeto kaj lia destino ne povas esti alia.





Sara Floro, publikigita en 1892; poste *La vojo de l' malbono* (1896), *La oldulo el la monto*, *Elias Portulo* (1903) kaj aliaj, per kiuj ŝi sukcesis fariĝi kiel unu el la plej bonaj junaj verkistinoj en Italio.

Ŝi fakte fariis ion grandan: ŝi malkovigis Sardinon. Meze de la dekoka jarcento nova movado naskiĝis en la ejiropa literaturo: la verkistoj ekredigis pri konstanta pasinto de modeloj el la greka kaj romia literaturo. Ili volis ion novan. Ili movado rapide aliancis kun alia starintaj en la sama epoko, kun la adorado de Rousseau pri la homo en sia natura stato, neruĝita de la civilizo. La nova skolo sosisinta el la du kuniĝintaj movadoj progresis kaj forlasis, speciale en la granda seculo de Romantismo. La plej lastaj trofeoj de tiu skolo estis ĝinigitaj de Grazia Deledda. Veras, ke en la priskribado de loka folkloro kaj de la kampara vivo ŝin antaŭis aliaj eĉ en ŝia propra lando. La

Anders Hallengren, profesoro ĉe la stokholma universitato, fama eseisto kaj redaktita kunlaboranto pri literaturo ĉe la Nobel-premia institucio, verkis en septembro 2002 belegan eson ornamitan per fotoj de li memn fariĝante en Sardinio, eke de la lokoj plej gravaj por la dekada verkaro. La eseo tioligas: *Grazia Deledda: la voĉo de Sardinio*. La unua ĉapitro (*Vintra norda nokto en 1927*) startas per la du sekvaj alineoj:

Je la dekoka kvardeko kvin de escepte malhela kaj frosta vintra vespero, la 8^o de decembro 1927, dum luna eklipso, eta itala virino atingis la centran stadionon de Stokholmo post trirlaga vojaĝo per trajno kaj pram-tiŝo. Ĝi estis ŝia unua vojaĝo al norda Eŭropo. El ŝia parto, ŝi vivintaj en Romo nur du semajnoj antaŭ ŝia alveno al Stokholmo, ŝi ricevis ĝeneralajn bildoj pri la timida virino kiu baldaŭ estus en la fokuso de ĉiuj atentoj. Altec: m. 1,55; aĝo: 56; okuloj: brunaj; hararo: blanka; haŭtkoloro: rozeta; naskidato: 1871 09 27; naskloko: Nuoro, Sardinio. Grazia Maria Cosima Damiana Deledda, edzino de Madesani, estis jubile bonvenigita ĉe la stadionon de komitato estrita de poeto Erik Axel Karlfeldt, la konstanta sekretario de la Sveda Akademio. Ŝin ŝi omagis per budoj kaj la naciaj koloroj de Svedio kaj Italio. (...)

Ln „regionista“ skolo en la itala literaturo havis elstarajn reprezentantojn kiel Verga, en la pentrado de Sicilio, kaj Fogazzaro, en la prezento de la lombard-venecia regiono. Sed la malkovado de Sardinio decidis ŝuldiĝas al Grazia Deledda. Ŝi intime konis ĉiun angulon de sia naskolando. Ŝi restis en Nuoro ĝis ŝia dudekkvina jaro: nur tiam ŝi trovis la kardoginiri al Cagliari, la ĉefurbo de Sardinio. Tie ŝi renkontis Madesani, la viron kiu ŝin edziniĝis en la jaro 1900. Post la geedziĝo ŝi kaj la edzo translokiĝis al Romo, kie ŝi dividis sian tempon inter la verkita laboro kaj la familiaj devoj. En la romanon verkitaĵ tiu post la translokiĝo al Romo ŝi plue traktis sardinajn temojn, kiel en *La hederlo* (1908).

Sed en postaj verkoj la intrigo ofte moviĝis en malpli lokalizitaj medioj, kiel ekzemple en ŝia plej lasta romano *La fuĝo al Egiptujo* (1925), kiu la [Sveda] Akademio ekzamenis kaj aprezis. Tamen, ŝia koncepto pri la homo kaj la naturo daŭre karakteriziĝas per fundamenta sareco. Kvankam ŝi estas nun sen arte pli matura, ŝi plu estas la sama serioza, elokventa sed simpla aŭtoro kiu verkis *La vojo de l' malbono* kaj *Elias Portulo*.

Estas malfacile por eksterlandano ĵuĝi la artan meriton de ŝia stilo. Tial mi citis tiurilate unu el la plej famaj literaturkritikistoj italiaj. *Sia stilo*, li skribas, *estas tiu de la grandaj prozaj majstroj: ĝi havas la karakterizan sigelon de la grandaj romanistoj. Neniu mantojmo en Italio verkis romanon kiu la stilo, la maŝtraco, la strukturo aŭ la socia ĝeneraco kiu mi trovas en kelĥaj, eĉ en la lastaj verkoj de Grazia Deledda, kiel La patrino (1920) kaj La sekreto de la seculo (1921).*

Oni povus nur noti ke ŝia teksto ne ĉiam havas la deziratan konsistan forton: neatenidite pasajoj ofte donas la impreson de hankaj transiroj. Sed tiu ĉi manko estas abunde kompensita de ŝiaj multaj virtroj. Kiel pentristo de la naturo ŝi havas malmultajn egulojn en la ejiropa literaturo. Ŝi ne disdutas superflue siajn brilajn kolorojn, sed la naturo kiu ŝi priskribas ĉiam havas la simplajn, vastajn liniojn de la antikvaj pejzaĝoj kaj ties ĉastan purecon kaj majestaton. Estas naturo mirinde vivanta, en perfekta harmonio kun la psikologia vivo de ŝiaj kreitaĵoj. Kiel vere granda artisto ŝi sukcesas enkorpigi siajn prezojtojn de la popolaj sentoj kaj kutimojn en la priskriboj de la naturo. Sufiĉas rememori la klasikan bildon pri la restado de la pilgrimantoj sur monto Lulaj en *Elias Portulo*. Ili ekiras en sama mateno. Familio post familio suprenmarŝas al la antikva votpreĝejo, kelkaj rajde, kelkaj en malnovaj ĉaroj. Ili kumportas provincentojn sufiĉajn por unu semajno. La plej riĉaj familioj loĝos en granda simloko proksime de la preĝejo. Tiu familio descendos de la fondintoj de la preĝejo, kaj pli per najlo en la muro kaj fajrujo markas la lokon al kiu ili rajtas. Neniu

alia povas meti piedon en tiun spacon. Ĉuvespere la familioj kunvenas en siaj respektivaj areoj tiom longe kiel la festoj daŭras. Ili kuiras siajn manĝojn sur la fajro kaj rakontas legendojn, ludas instrumentojn kaj kantas dum la tuta, longa somernokto.

En la romano *La vojo de l' malbono* Grazia Deledda priskribas per la sama vigla stilo la stranganj sardinaj kutimojn pri nutoj kaj enterigoj. Kiam enterigo estas preparata, oni fermas ĉiujn pordejn kaj ĉiujn ŝturojn, estingas ĉiujn fajrojn (estas malpermesite kuiru manĝojn), kaj dunginta plorantinoj krias sianj improvizitajn lamentojn. La pentrado de tiel primitivaj kutimoj estas tiom verŝajna, tiom simpla kaj naturna ke ni preskaŭ emas nomi ĝin Homera. En la romanon de Grazia Deledda, pli ol en la plejparto de la aliaj romanoj, homo kaj naturo formas nedivisigblan unuon. Oni povus preskaŭ diri ke la homoj estis plantoj kiuj naskiĝas spontane sur la sardinaj grundoj. Plejparte ili estas simplaj kamparanoj, kiuj primordive sentas kaj pensmaniero, sed kiam ene ion de la naturo grandeculo de la insulo. Kelĥaj el ili preskaŭ atingas la nivelon de la monumentaj figuroj en la Malnova Testamento. Kaj ne gravas kiom malmalilaj ili aspektas kompare kun la homoj kiujn ni konas: ili donas al ni la impreson esti nekosteteble realaj, apartenantaj al la vera vivo. Neniamiere ili similas al teatraj marionetoj.

Grazia Deledda estas majstro en la arto kunfandi realismon kun idealismo. Ŝi ne apernatas al tiu hando de verkistoj kiuj laboras super tezo kaj diskutas problemojn. Ŝi ĉiam tenis sin malproksime de la aktualaj bataloj. Kiam Ellen Key kiel unua klopodis interesiĝi sin al tiu diskutado, ŝi respondis: *Mi apartenas al la pasinteco*. Elebe tiu konfeso ne estas tute ĝusta. Certe Grazia Deledda sentas sin kulpo-pla per fortaj amligajoj al la pasinteco, al la historio de sia popolo. Sed ŝi ankaŭ scias kiel vivi kaj reagi al sia tempo. Kvankam ŝi ne interesiĝas pri teorioj, ŝi havas grandan intereson por ĉiuj aspektoj de la homa vivo. En letero ŝi skribis: *Nia granda turmento estas la forpasado de la vivo*. Jen kiel ni devas klopodi ĝin malrapidiĝi, interesiĝi, por doni al ĝi kiel eble plej riĉan signifon. Oni devas klopodi vivi super sia vivo, kiel nubo super la maro. Kaj ĝuste ĉar la vivo sajnas al ŝi tiel riĉa kaj admirinda, ŝi neniam partianicis en la politikaj, sociaj aŭ literaturaj disputoj de la momento. Ŝi amis la homon pli ol teoriojn kaj vivis sian kvietan vivon for de la monda tumulto. *La destino*, ŝi skribas en alia letero, *naskiĝis min en la koro de la soleca Sardinio*. Sed eĉ se mi estas naskiĝinta en Romo aŭ Stokholmo mi ne estas alia. Mi ĉiam estas estinta kiu mi estas – animo pasie instata de la vivo, problemoj, kiu klare vidas la homojn kiel ili estas, ĉiam konsciante ke ili povus esti pli bonaj ol ili estas kaj ke nenio krom ili mem malhelpas la realigon de la Dio regno sur nia tero. Ĉio estas malamo, sangoo, doloro: sed, eble, iam ĉio estas konkerita de amo kaj bona volo.

Tiu ĉi lastaj vortoj klarigas sian vivkoncepton, seriozan kaj profundan koncepton kun religia fono. Ĝi estas

ofte malĝoja, sed neniam pesimisma. Ŝi kredas ke la forto de la bono fine venkos en la vivbatalo. La principoj kiuj regas sian tiun verkistan laboron estas montritaj klare kaj sinteze fine de la romano *Cindro* (1904). La patrino de Anania riumiĝis. Por ne obstakli la felicon de sia filio, ŝi sin mortigas kaj nun kuŝas kadavre antaŭ li. Ŝia filio estis nur bebo, ŝi donis al li amuletino. La ĝin malfermas kaj vidas ke ĝi entenas nur cindron. Jen, ĉio estas *cindro*: vivo, morto, homo. *Et la destino kiu ŝin kreis. Kaj ankaŭ en la lasta horoo, dum li staris ankata la korpo de la plej kumpatinda el la homaj kreitaĵoj, kiu transferinte la malbonan en ĉiuj siaj formaj morto per la bono de ŝia alia, li memoris ke inter la cindroj aĝo sparkas la brilo de luna kaj puriga flamo. Kaj li esprimis. Kaj li plu amis la vivon.*

Alfred Nobel deziris ke la Literatura Premio estu donita al persono kiu, en siaj verkoj, veris sur la homaron nekartan inkolantatan la sanan energio de altmorala vivo. Konforme al lia deziro, la Sveda Akademio asigis la Premion al Grazia Deledda „pro siaj idealisme inspiritaj verkoj, kiuj per plasta lara pentrado trans la vivon de ŝia insulo kaj nun profundece kaj simpatio entute traktas la homajn problemojn“.

Ĉefepiskopo Nathan Söderblom aldionis:
 (...) Vi, sinjorino, vidis straitsingulojn kiujn la vojaĝantoj malatentas. Por vi doonas portas al Dio. Tial vi kredas en la renaskiĝo malgrati la degraĝigo kaj malforceco de la homo. Vi scias ke elbas reboniĝi la marĉon, por ke ĝi farigu ĵojojn kaj fruktodona tero. Tial, luna radio ĝilas en viaj libroj. Tra la malumo de la homo mizerio vi bringas la konsolon de lumo ne estingebila.



Lasta esoto el *Cindro* (1916), regiĝoro kaj kumpatronigito Grazia (Marj), la plej fama filmo bazita sur romanon de Grazia Deledda. Kvankam muta, ĝi estas ankoraŭ nun fascino por la estara rolado de Eleonora Duse, kiu ankaŭ verkis la scenaron. La granda teatra aktorino nur dufoje rolis en kino, kaj tiu post jam longjara retrigo el la rivalitoj. Ŝin konkeris la sublima figuro de Oli, la misorta partonoro korsire amanta kaj amata, kiu donas sian vivon por la felico de la filo.

LA PATRINO



Dum tiu nokto Paŭlo denove estis preta por eliri.

Lia patrino, en apuda ĉambro, lin aŭdis moviĝi malrapide, kaŝeme. Por eliri li eble atendis ke ŝi estingu la lampon kaj kuŝu en sia lito. Ŝi estingis la lampon, sed ne kuŝis: sidante apud la pordo ŝi kunpremadis la malmolajn servistinaĵn manojn, ankoraŭ malsekajn pro la laboro farita lavante kaj gargarante la potaron.

Ŝi premis, unu kontraŭ la alia, la poleksojn, por doni forton al si mem; sed pli kaj pli ŝia maltrankvilo kreskis, venkante ŝian obstinan esperi ke la filo kvietigos, kaj legos, aŭ dormos, kiel aliffoje. Fakte, dum kelkaj minutoj la obtuzaj paŝoj de la juna pastro ĉesis: oni aŭdis nur la bruon de la vento ekstere, kune kun la murmuro de la arboj sur la taluso malantaŭ la eta parofojejo. Vento ne tro forta, sed senĉesa kaj monotona, kiu ŝajnis vindi la domon per granda, grinca rubando ĉiam pli sufoka, klopodante ĝin elŝiri el sia bazo por ĝin diŝjeti.

Jam la patrino estis fermita la stratan pardonon per du krucstangoj, por malpermesi ke la diablo, kiu dum la ventaj noktoj vagas serĉante animojn, penetru hejmen. Tamen ŝi finfine malmulte kredis tian superstiĉon, kaj nun ŝi pensis kun amaro, kaj kun iom da moko kontraŭ si mem, ke la spirito malbona jam estis ene de la parofojejo, trinkas el la kruĉo de ŝia Paŭlo kaj rondiras ĉirkaŭ lia spegulo, pendigita ĉe la fenestro.

Jen Paŭlo moviĝis denove: eble li ja estis antaŭ la spegulo, kvankam tio ne estas permesita al la pastroj. Sed kion li ne pernesadas al si, jam de kelka tempo? La patrino memoris ke ofte, en la lastaj tempoj, ŝi surprizis lin speguliĝi kiel virinon, purigi kaj poluri la ungojn, brosi la harojn kiujn li kreskigis kaj suprenlevas, kvazaŭ en la klopodo kaŝi la sanktan signon de la tonsuro. Plie, li uzis parfumojn, purigis la dentojn per bonodoraj pulvoroj, kombis eĉ la brovojn...

Al ŝi nun ŝajnis vidi lin, kvazaŭ la vando inter iliaj ĉambroj estus fendita: nigra surfone de lia tutblanka ĉambro, alta, eĉ tro alta, balanciĝema, li iris tian reen per sia paŝo de knabo senatenta, ofte stumblante kaj glitante, sed ĉiam restante en ekvilibro. Li havis kapon tro dikan sur kolo svelta; lian palan vizaĝon subpremis elstaran frunton, kiu ŝajnis kuntiriĝi la brovojn klopodantajn ĝin subtenaj kaj devigi la longajn okulojn resti duonfermitaj. Aliflanke la fortaj mandibloj, la granda buŝo karnoriĉa, la malmola mentono ŝajnis siavice ribeli kun indigno kontraŭ tiu subpremo, el kiu tamen ili ne sukcesis liberiĝi.

Sed jen li haltis antaŭ la spegulo, kaj la tuta vizaĝo fariĝis luma, ĉar levigis la palpebroj kaj en la diafaneco de liaj okuloj kaŝankoloraj la pupilo radiis kiel diamanto.

(traduko de Giuseppe Certosina, iom adaptita de la redakcio)

BIBLIOGRAFIO DE GRAZIA DELEDDA
(nur la ĉefaj titoloj)

- 1890 **Nell'azzurro** (En la bluo)
- 1891 **Stelle d'oriente** (Orientaj steloj)
- 1892 **Fior di Sardegna** (Sardia floro)
Amore regale (Reĝa amo)
- 1894 **Racconti sardi** (Sardaj rakontoj)
- 1895 **Anime oneste** (Honestaj animoj)
- 1897 **La via del male** (La vojo de l' malbono)
Il tesoro (La trezoro) / **L'ospite** (La gastoj)
- 1899 **La giustizia** (La justico) / **Le tentazioni** (La tentoj)
- 1900 **Il vecchio della montagna** (La oldulo de l' monto)
- 1902 **Dopo il divorzio** (Post la divorco)
La regina delle tenebre (La reĝino de l' tenebroj)
- 1903 **Elias Portolu**
- 1904 **Cenere** (Ĝindro)
- 1905 **Nostalgie** (Nostalgieoj)
I giochi della vita (La ludoj de la vivo)
- 1907 **L'ombra del passato** (La ombro de l' pasinto)
- 1908 **L'edera** (La hedero) / **Il nonno** (La avo)
- 1910 **Il nostro padrone** (Nia mastro)
Sino al confine (Ĝis la landlimo)
- 1911 **Nel deserto** (En la dezerto)
- 1912 **Colombi e sparvieri** (Kolomboj kaj nizoĵ)
Chiaroscuolo (Klaroskuro)
- 1913 **Came al vento** (Kanoj en la vento)
- 1914 **Le colpe altrui** (Alies kulpoj)
- 1915 **Marianna Sirca**
Il fanciullo nascosto (La kaŝita infano)
- 1918 **L'incendio nell'uliveto** (La incendio en la olivarbaro)
- 1919 **Il ritorno del figlio** (La reveno de l' filo)
La bambina rubata (La ŝtelita knabineto)
- 1920 **La madre** (La patrino)
- 1921 **Il segreto dell'uomo solitario** (La sekreto de la soleculo) / **La grazia** (La graco, novelo)
Cattive compagnie (Malbonaj kolegaroj)
- 1922 **Il Dio dei viventi** (La Dio de la vivantoj)
- 1923 **Il flauto del bosco** (La fluto de l' arbaro)
- 1925 **La fuga in Egitto** (La fuĝo al Egiptujo)
- 1926 **Il sigillo d'Amore** (La sigelo de l' Amo)
- 1927 **Annalena Bilsini**
- 1928 **Il vecchio e i fanciulli** (La maljunulo kaj la infanoj)
- 1930 **Il dono di Natale** (La donaco de Kristnasko)
La casa del poeta (La domo de l' poeto)
- 1931 **Il paese del vento** (La lando de l' vento)
- 1932 **La vigna sul mare** (La vimberejo ĉe l' maro)
- 1933 **Sole d'estate** (Somera suno)
- 1934 **L'argine** (La digo)
- 1936 **La chiesa della solitudine** (La preĝejo de la soleco)
- 1937 (posteume) **Cosima**
- 1939 (posteume) **Il cedro del Libano** (La lebanona cedro)

El diversaj romanoj de Deledda aperis kinaj aŭ televidaj versioj, ĉiam kun altnivela aktorado kaj reĝisorado. El la novelo *La graco* la komponisto Vincenzo Michetti verkis operon, kiu siavice fariĝis filmo en 1929. Kompreneble abundas tradukoj de ĉiuj verkoj, ne nur de la romanoj, en multegaj lingvoj.

En esperanto aperis nur *La patrino* (1983), kuraĝe tradukita, bedatirinde ne elstare, de G. Certosina kaj eldonita de Mestrina Editrice en 1983.

Familiara kiel akvo de I' Rivero

En 2005 la delikata sed firma mano de la hinda reĝisorino Deepa Mehta plektas virinajn vivojn en fikcio kiu havas la guston de dokumenta filmo. Sur la fono de revolucioj, konverĝaj al la rolo de Gandhi: kontraŭ la subpremo de la fremdaj koloniistoj kaj kontraŭ la subpremo de jarmilaj tradicioj, en la Hindio de 1938.

La baza intrigo originas el tia tradicio: vidvino devas eniri la klaŭzuron de specifa aŝramo, se ŝi mem ne sin mortigas post la forpaso de la edzo aŭ ne reedziĝas al la plej juna bofrato. El tiu strikta, religia kaj socia, normo eskapas eĉ ne okjara infano, Chuyia (Sarala Kariyawasam). Fakte temas pri ia milda formo de dumviva entombigo.

En tiu enfermejo vivo kaj morto fluas kiel la najbara riverego. Metaforo kaj rimedo por la tuta historio, la akvo donas la titolon al la filmo mem, *Akvo*. Ne nur la rivera: ankaŭ tiu verŝita el sĉelo, kiu hazarde trafas Narayan (John Abraham), la enamiĝonton al Kalyani (Lisa Ray), juna vidvino kiu per prostituigo al bramana riĉulo subtenas finance la aŝramon. Ne nur la rivera: ankaŭ tiu verŝita de la ĉielo, la pluvo kiu plaludas erfeliĉaj momentoj.

En la filmo iom post iom reliefas tamen kvara persono – Shakuntala (Seema Biswas), la vidvino plej firma en la hindua kredo, kiu fine ŝanceliĝas aŭdinte la vortojn de Gandhi mem: *Mi opinias ke Dio estas la vero, sed mi eraris: fine mi komprenas, ke la Vero estas Dio*. Nek ŝi, nek Kalyani, nek la pli aĝaj vidvinoj savos sin: eble nur Chuyia, kiun Shakuntala konfidis al Mahatma.


Sed probable eĉ ne Chuyia, se oni pensas ke en la nuntempa Hindio multaj milionoj da vidvinoj plu vegetas en la samaj kondiĉoj de 1938. Kaj precipe se oni scias, ke hindujaj fundamentalistoj klopdas malhelpi la realigon de la filmo, ne malpli ol islamanoj agas en araba lando.

Akvo estas fajne feminisma filmo, turnita de virino per virinoj por virinoj, kun mirinda fotografia subteno (de Giles Nuttgens). La pejzaĝa dolĉeco per si mem montras, kiom altgrada povas esti la pretesto kontraŭ la femina kondiĉo, eĉ se ĝi ne laŭtas akre. Sed ĝuste la amareco de la filmo kuŝas en ĝia profunda nostalgio pri dolĉeco.

La revata dolĉeco de la malpermesataj kuketoj kongruas kun la nur imagebla dolĉeco en seksa rilato: ĉu sekso povas esti alio ol vorto nekomprenebla por infanaĝa edzino? alio ol sinonimo de prostituigo por bela, plenkreska vidvino?

La hindua vidvineco signifas la perdon de la propra familio, la nuligon de la rajto havi familion: Chuyia ne plu vidos siajn gepatrojn kaj siaj gefratojn; la aliaj vidvinoj eĉ forgesis pri sia devena familio.

Tiu frustrita aspiro al propra familio tredigiĝas filigrane en la rakonto, jen espere jen despere, kaj malspere pro la silenta sinmortigo de Kalyani.

Deepa Mehta komprenigas, ke en Hindio la virinoj povis atendi pliboniĝon de sia kondiĉo nur post la ĉeso de socio bazita sur kastoj. La rajto libere formi propran familion estas parto de tiu kontraŭkasta lukto, kies karaktero estas tute alia ol la interklasa batalo en okcidento. Precipe ĉar la revolucia Gandhi strebis al senkasta socio, dum la revolucia Marx ne strebis al senklasa socio, sed al la diktaturo de unu el la sociaj klasoj. Tiurilate la kamerao de Deepa Mehta trafas la esencon: ne sufiĉas la ŝanĝo de la ekonomia faktoro, por la venko de feminismo. 

recenzas
Giorgio Silfer



“Akvo”
de Deepa Mehta,
produktis David Hamilton
historie-fikcia filmo, 112’
2005

Kontraŭvola edzinigo: ĉu ankoraŭ tolerebla?

de Leen Deij

Estas malfacile diri, kiom da knabinoj kaj virinoj en Eŭropo fariĝas viktimo de kontraŭvola edzinigo kaj honorvenĝo. Multaj tragedioj okazas post la dompordo. Sed antaŭ la somera libertempo la nederlandaj virinŝirmejoj ĉiam devas gastigi neordinare pli multajn islamajn knabinojn. Ili timas kontraŭvolan edzinigon en la devenlando.

Ankaŭ en Britio ne ekzistas konkretaj ciferoj, tamen iom pli da indikoj. En la urbo Luton, kie loĝas granda pakistana malplimulto, pasintjare 300 junulinoj kontaktis la lokan helptelefonon. Kompetentuloj ne ekskludas, ke la vera nombro estas dekoble pli alta. Ne temas nur pri islamanoj el Pakistano. Ankaŭ Sifioj, Hinduoj kaj kelkaj kristanaj grupoj prak-

*En Francio, en Germanio,
en Italio, ĉie...
eĉ en Svislando tiaj
abomenaĵoj okazas, kaŝe
sed ĉiam pli ofte.*



tikas truditan edzinigon. Post la pasintjara libertempo la aŭtoritatoj en Bradford ne povis trovi 33 knabinojn.

Ekzemplo. Ŝi estis deksepjara kaj unufoje pasigis la libertempon ĉe parencoj en Pakistano, la devenlando de la gepatroj. Baldaŭ ŝi rimarkis nuptopreparojn. "Kiu edziniĝos?", ŝi naive demandis al la patrino. "Vi!", estis la respondo. Tiel Shazia Qayum, kreskinta en Birmingamo, estis kontravivole ligita de siaj gepatroj al pakistano, kiun ŝi neniam vidis antaŭe. Kvankam ŝi tuj diris al li, ke ŝi ne amas lin, la viro tute ne estis embarasita. "Kun mi li nur volis veni al Anglio", diras la nun 28-jara Qayum en la kontoro de *Karma Nirvana* en la angla urbo Derby. Karma Nirvana helpas virinojn, kiuj estas viktimoj de trudedziniĝo. Kontraŭvola edziniĝo devenas de tradicia vilaĝa kulturo en grandaj partoj de Sud-Azio, Proksima Oriento kaj Afriko. La gepatroj elektas la vivpartneron de filoj kaj filinoj, kiuj devas akcepti tion. Kiu rezistas, tiu riskas forpelon.

Pli kaj pli da junaj homoj trovas alloga la individualismon de okcidentaj samaĝuloj kaj konfliktas kun gepatroj kaj geavoj pri tiu sentomova kaj emociplena temo. En aprilo 2008 Karma Nirvana ekproponis nacian helplineon por virinoj, kiuj estas viktimoj de kontraŭvola edziniĝo. La kunlaborantoj ricevis pli ol du mil alvokojn antaŭ la jarfino, ankaŭ el eksterlando.

Jasvinder Sanghera estas la fondintino de Karma Nirvana. Kiam dekvinjara ŝi fuĝis de kontraŭvola edziniĝo kun hinda siĥo. Pasintjare ŝi publikigis la libron *Shame* (Honto) pri la sorto de ŝi mem kaj de multaj junaj homoj. "La familio dolorigas ilin kiel neniu fremda homo iam farus", ŝi skribis. "Li sufero estas nevidebla, ĉar perforto pro honoro okazas post fermitaj pordoj, sed ĝi reale ekzistas kaj kancera ŝvelaĵo enŝteliĝas en nian komunumon".

La gepatroj de Shazia Qayum minacas teni ŝin en Pakistano, se ŝi ne subskribus la peton pri vizo por sia edzo. Finfine ŝi rezignacis. Kiam la edzo alvenis en Birmingamo, la gepatroj decidis, ke ŝi ne plu rajtas labori eksterdome. Tion ili trovis nekonsenta por edziniĝinta virino. "Mi staris antaŭ la decido, ĉu plene foroferi min mem, ĉu fuĝi kun ĉiuj koncernaj riskoj", diras Qayum, kiu malsame al la pli multaj aziaj virinoj en Derby, portis ĝinzon kaj provokan lanan kaskedon. Ŝi elektis la fuĝon. Danke al iom da ŝparita mono ŝi povis enloĝiĝi en pensiono. Kontraŭ propra konvinko ŝi esperis ricevi de la gepatroj telefonan alvokon pri nova bonvenigo en la hejmo. "Sed por ili mi estis morta. Laŭ ilia opinio mi makulis la honoron de la familio".

Qayum, kiu nun mem laboras por Karma Nirvana, eskapis sen severa puno. Regule samsortaninoj, kiuj estas perfortitaj aŭ alimaniere torturitaj, petas helpon. La venĝo de la familio al filinoj (kaj filoj), kiuj ne obeas la volon de gepatroj aŭ komunumo povas esti terura. Se filino fuĝas kun memelektita amanto, ŝi estos mortigita. Kiam Qayum mem estis dekdjara, ŝi ĉeestis eksceson, al kiu kondukas ofendita honoro. Kun sia plej bona pakistana amikino Samina ŝi sidis post la lernohoroj en parko, anstataŭ tuj kaj rektlinie iri hejmen, kion ambaŭ familioj

Kontraŭvola edz(in)eco karakterizas multajn intrigojn en teatro, ekde la itala *Commedia dell'Arte*, sed ĝenerale kun celo kontraŭfeminisma. Tia estas *Edziĝo kontraŭvola* – unuakta groteskajo de Molière, kun muziko, kanto kaj danco.

La maljuna kaj riĉa Sganarello decidas rezigni pri la edziĝo al la bela Dorimena, ekvidinte ke la junulino estas tro kaprica kaj malavara. Sed ŝia frato altrudas al li la edziĝon per senkompataj bastonfrapoj.

En la traduko de Victor Dufrenot (eldonis Presa Esperantista Societo en Parizo), la komedio estis prezentita dum la unua UK en Bulonjo-ĉe-Mar, 1905. Domaĝe, ke la esperantan tradicion inaŭguris milde kontraŭfeminisma teatraĵo.

ja atendis. En la parko estis ankaŭ knaboj. Preterpasantoj vidis tion kaj informis la patron de Samina. Tiu rapidis al la parko, trenegis sian filinon per la haroj hejmen kaj prenis armilon. Kiam la patrino intervenis, li mortpafis ŝin. La sama sorto trafis Saminan kaj fratinojn. Poste la viro mortpafis sin mem.

Daŭris longe antaŭ ol la brita registaro ekatentis la problemojn ĉirkaŭ kontraŭvola edziniĝo kaj honorvenigo. La registaro longe hezitis miksi sin en la privatan vivon de civitanoj. Krome estas malfacile streki limon inter aranĝita geedziĝo, ofta kaj laŭleĝa ĉe multaj azianoj kaj afrikanoj, kaj kontraŭvola edziniĝo. Sed nun la registaro laŭpove kontratiadas truditan geedziĝon, ĉar ĝi konscias, ke temas pri fundamenta rompo de la homaj rajtoj. En la komenco de 2005 la Ministerioj pri Enlandaj kaj Eksterlandaj Aferoj kune fondis unuon, kiu sin okupas pri kontraŭvolaj geedziĝoj. *Por tio ne estas loko en nia socio*, diris s-ino Jacqui Smith, ministro pri Enlandaj Aferoj. La britoj altigis la minimuman aĝon de geedziĝaj partneroj en eksterlando ĝis 21 jaroj. La aŭtoritatoj pli severe kontrolas, ĉu post la somera libertempo infanoj revenas al la lernejo. Britaj eksterlandaj ambasadoj kelkfoje sukcesis trovi kaj liberigi infanojn trade retenitajn por geedziĝo.

Karma Nirvana bedaŭras, ke la registaro ne kuraĝas nomi kontraŭvolan geedziĝon krimo. *Tiukaŝe multaj azianoj pli funde pripensus antaŭ ol devigi siajn infanojn*, klarigas Shazia Qayum.

Parto de la loka socio en Derby abomenas la laboron de Karma Nirvana. *Oni ofte riproĉas al ni, ke ni "okcidentigas" iliajn infanojn. Ne enmiksiĝu en niajn aferojn!*" diras Anna Hardy, indiĝena, angla kunlaborantino. Kaj Jasvinder Sanghera kaj Shazia Qayum kelkfoje devis peti polician protekton. Aldonas Hardy: *Pro malestimo oni foje ŝmiras fekaĵon sur la fenestrojn de nia kontoro.*

Karma Nirvana kun plenmano da kunlaborantoj kaj volontuloj apenaŭ povas plenumi ĉiujn petojn pri helpo. En la sekurigitaj domoj por fuĝintaj virinoj validas atendotempo. En Derby tamen sin montras signoj pri ŝanĝiĝo. *La juna generacio kredas pli al amikeco ol al la tradiciaj ideoj pri familio kaj geedziĝo*, diras la tridektrijara Mustapha Haider, kiu pasas surstrate antaŭ la kontoro de Karma Nirvana. Naved Afzal, trideksepjara teknikisto en la loka Roll Royce-fabrikejo, subtenas lin: *Mortigi homojn ĉar oni opinias ke la honoro de la familio estas profanita, estas freneze!*

Panjo kaj Morto

de Etel Zavadlav

Se ion mi malŝatas – mi malŝatas sardelojn.

Finfine mi kisis knabinon. Mi, dektriarulo, kisis dekjaran dancistinon. Kia honoro! Dank' al mia Panjo.

Ĉiuj kiuj konis mian Panjon povas konfirmi ke mi ne troigas asertante ke ŝi estis dezirinda bopatrino – ŝi ne havis ian intencan enmiksiĝi en alies aferojn. Nur lasu ŝin okupiĝi per sia libero, viziti teatron, kinejon, fari ekskursojn, aŭskulti muzikon. Kaj rendevui kun siaj multnombraj amikoj. Principe viraj, kompreneble.

Mi sciis ke Panjo ne plu amas Paĉjon. Li estis nula homo, enkorpigita misero. Li ne havis monon. Li ne ŝoforis. Li ne kapablis farbi la murojn memstare. Li estis magra kaj nervoza, ĉiam grumblanta. Panjo ne kaŝis ke ŝi ne amas lin. Tiam mi pensis ke Panjo nenion kaŝas.

“Neniam en mia vivo mi lekis piĉon!”, publike fanfaronis mia patro. Liaj amikoj el la strato – publiko por tiu monologo – mokriditis ĉe tio.

“Kiu do lekas vian edzinon, Toni?”

“Ĉu mi rajtus anstataŭi vin por tiu devo?”

“Idioto, vi perdos la edzinon!”

Li sentis sin tre bone ĉar li neniam lekis piĉon. Kvazaŭ pro tio li meritis oran merit-medalon.

Pro la fakto ke ĉiuj sciis ke li estas kokrito, li ne tiom bone sentis sin. Tiun suferon li kutimis dronigi en botelon. Ĉu sobran, ĉu ebrian, Panjo same lin abomenis.

Mia Panjo. Ŝi estis grafino el getto. Kutage ŝi konsideris sin punita per la fakto ke ŝi naskis kvinfoje – mi havis du fraĵojn kaj du fratinojn. Ŝi opiniis nin puno por siaj pekaj. Miaj fratinoj estis de alia patro – ni estis duonfrataj. La unua edzo

de Panjo sin mortigis. En la dudekkvina vivjaro, li ĵetis sin el kampanilo. Kiam li aŭdis ke li havos unu plian infanon. Post kelkaj monatoj naskiĝis Ani, mia dua duonfratino. Diketa, malalta, nebela – ŝi estis kompleta malo ol Venia, la unua filino de Panjo. Venia – princino, fiero kaj honoro de la tuta familio, estis “Miss” dufoje. Nigrehara, bluokula, bonstatura. Neniu rezistis al Venia. Kaj Ani, povurino, ĉiam sidis hejme kiel muso.

“Cindrulino – jen mia sorto.”

Sed Ani estis pli trankvila persono, preta por helpi, sindonema kaj diligenta. Venia kutimis vivi de sia ĉarmo, de siaj ridetoj. Venia sin nutris per via admiro. Tion ŝi heredis de Panjo. Ege pigra virino estis mia fratino Venia.

Kiel okazis ke mi dektrijara kisis dancistinon?

Panjo ne havis difinitajn aŭ klarajn kriteriojn; ŝi ŝatis ĉiujn virojn. Preskaŭ ĉiujn. Blondaj, nigraj, altaj, fragilaj, korpulentaj, adoleskuloj, olduloj – ĉiuj estis akcepteblaj. Se ŝi sufiĉe drinkis. Ŝi kapablis flirti kun pliaj samtempe, kaj tion ŝi faris virtuoze.

Iam okazis ke ni troviĝis ĉe iu festo. Mi ne plu memoras, ĉu ies naskiĝtago, aŭ simile, sed oni manĝis kaj trinkis abunde. Ĉeestis gitaristo, forta viroto en siaj malfruaj kvardekaj. Panjo flirtis kun li ĉar ne ekzistis alia elekto.

“Ĉiam mankas bona masklajo.” – ŝi kutimis komenti, kvazaŭ temus pri viando – safajo, bovidajo, aŭ simile.

Masklajo. Masklajo. Masklajo.

Kiam mi fariĝos masklajo?

Ĉu agrablas esti aĵo por ina elspezado, por plezurigo de sorĉistino?

Ho jes, sendube plaĉas esti tiu karno ardanta – mi legis la respondon en la La

bluaj okuloj de la gitaristo. La povrulo ekpensis ke li vere plaĉas al Panjo.

Jam mi traviris noktajn poluciojn, jam mi sciis kio okazas kiam kolegiĝoj senhontaj metas la manon sur mian pisilon. Pisilo, jes.

Sed neniam mi kisiss iun knabinon.

La blukula gitaristo havis filinon. Antonia estis dancistino. Niaj gepatroj, jam bone ebriaj, konsentis pri nia onta geedziĝo.

"Tuj mi subskribus ke Antonia nasku miajn nepojn", diris Panjo.

"Estus mia honoro havi bofilon kiel Stanislaŭ", aldonis Gitaristo.

Kaj mi videble plaĉis al la dancistino. Ŝi ruĝiĝis.

Panjo permesis al mi drinki iom. De tie venis mia kuraĝo. Mi prenis la manon de Antonia kaj kondukis ŝin malantaŭ la dometon, kie neniu nin vidas. Kaj mi kisiss ŝin. Simple.

Dudek jarojn poste, mi serĉis Dancistinon por plenumi la promeson – mi volis vere edziĝi kun ŝi. Sed Antonia malaperis. En mia rememoro ŝi restis la plej delica kaj delikata el ĉiuj amspertoj, kiun mi poste travivis. Mi volis ke Antonia nasku nepojn al Panjo. Sed tio ne povis okazi, ne estis destinite. Gitaristo estis nur momenta kaprico de Panjo, kiu daŭris ne pli ol tiun tagon. Kaj Antonia dancis nur tra miaj sonĝoj, longe. En blanka baletistina jupeto, kun plektita hararo, Antonia Blanka.

Mi iris al teatro por havi ŝian foton.

Antonia Blanka vojaĝis kun mi tra la maroj, dum miaj navigadoj.

Ŝia senkulpa vizaĝo devis esti turnita al muro dum mi amoris kun amikinoj de maristoj. Pri tio mi pedante zorgis.

Post dudek jaroj mi revenis al teatro, kun tiu sama foto de Blanka Dancistino. Neniu havis informon pri la disvolvo de ŝia hela kariero. Ŝi estis steleto tiam, oni prognosis al ŝi mondan famon – sed ŝi malaperis.

Ne estas mi persono facile rezignanta. Mi serĉis rusinon, ŝian iman instruistinon.

Albina Petrovna, emerita baletpeda-

gogo, loĝis sola en malpura domaĉo. Ŝi estis vidvino.

"Certe ke mi memoras Antonian, kiel ŝin forgesi!", diris Albina, vidinte la foton. Tuj mi bedaŭris ke mi donis la foton de sanktulino al tremanta mano de alkoholdependa virinaĉo.

"Kion vi pretas donaci al mi, por la informo pri Antonia?", tuj elbuŝigis tiu besto.

Mi montris centdolaran monbileton. Albina intencis tuj ĝin forŝiri el mia mano, sed mi malebligis tion. Avidaj okuloj senpacience eklumis.

"La patro de Tonja murdis sian edzinon. Li malkovris ke ŝi perfidis lin. La knabino restis orfa. Oni ŝin sendis al orfejo. Tial ŝi ne plu povis daŭrigi la ekzercadon. La patro neniam eliris el prizono – tie li mortis, nur kelkajn semajnojn antaŭ la fino de sia puno."

Povra princino! Mi volis ŝin flegi, leki ŝiajn vundojn, helpi ŝin. Antaŭ ol ĉio, mi volis ŝin renkonti.

* * *

Kiam mia patro mortis, ni ĉiuj timis ke

Panjo vere faros

bruan feston,

kiel ŝi juris

dum jar-

dekoj.

Tamen

Panjo

sin de-

tenis

de


tiu


stultaĵo. Ŝi nur kunmetis mortanoncon: *Kun gaja koro ni informas ĉiujn ke mizera pediko Toni Gabrov, kiu neniam lekis piĉon, forlasis nin. Gratulojn ni akceptas volonte. Festo okazos en nia ĝardeno.*"

Mia frato apenaŭ konvinkis ŝin tion ne publikigi. Nun Panjo ne plu hontis pro nia ekzisto – ni ĉiuj plenkreskis, kaj ŝi estis fiera panjo de malofta familio. Plaĉis al ŝi tiu rolo.

Post sia kvardeka naskiĝtago, Panjo komencis dikiĝi. Ŝi perdis la iaman talion kaj fajnfragilajn femurojn. Surprize, plaĉis al ŝi tiu ŝanĝo. Ŝi ŝatis la korpon – kaj propran, kaj de aliaj. Panjo daŭre estis alloga, eĉ pli ol antaŭe.

Mia duonfratino Ani frue edziniĝis. Silenta kaj pacienca, ŝi trovis modestan knabon kun modesta domo. Ŝi mem laboris kiel fizioterapeŭto. Ani neniam naskis. Mi estis ŝokita kiam ŝia edzo konfidis al mi ke ili neniam konsumis la geedzeccon.





modesta laboristo estis modeste samsekema. Mia bofrato provis alogi min. Ani – vi restos cindrulino kun dika himeno, mi cerbumis.

Panjo restis indiferenta je tiu informo. “Mi scias.”, estis ŝia nura reago.

Ankaŭ Filipo, mia pli aĝa frato, fariĝis maristo. Li estis ferdeka oficiro kaj mi ŝipmotoristo. Niaj du salajroj estis pli ol sufiĉaj por renovigi la domon, post la morto de Patro. Finfine ni povis forĵeti la rubajaron kolektitan de li.

Panjo estis ege fiera pri ni du – ni aldonis supran etaĝon subtegmentan, kun kliva tegolaro, kiel ŝi ĉiam revis. Tie ŝi havis propran mansardon sunplenan.

La aĝo kunportis siajn fruktojn – Panjo ne plu havis tiomajn amikojn, amantojn, amantojn. Ĉu pro perdo de intereso, ĉu pro hezito – nur kelkaj konstantuloj ŝin vizitadis. Tiuj samaj de jardekoj, ŝiaj fidelaj adorantoj, kiuj preskaŭ apartenis al la familio. Sed novajn ŝi ne plu trovis.

Nia plej juna frato fariĝis frizisto. Li edziĝis la unua.

“Gomo gardas la kapon”, milfoje Panjo ripetadis dum ni estis infanoj.

Kiam ni fariĝis adoleskaj, ĉiam ŝi enmetis po skatoletto da kondomoj en niajn poŝojn.

Sed Toni ne obeis – ne plaĉis al li surmeti gumon. Dekokjara li patriĝis. Kelkajn monatojn post la morto de Patro. Lia filo prenis la nomon honore al avo kaj patro – Toni la Tria.

Estante stultulo, Toni ne lernis sian lecionon; en rekorda tempo li havis kvin infanojn. Kaj mirinde – kun unusola edzino. Panjo ne estis tre kontenta, sed ŝi akceptis la situacion. Baldaŭ ŝi alkutimiĝis al tiu bofilino.

Bofilino.

Antonia.

Dancistino.

Blanka.

Princino.

Denove mi sercis ŝin. Mi ne rezignis.

Esplorado min kondukis al orfejo en la ĉefurbo. “Ni ne estas rajtigigitaj doni informojn pri niaj protektoj.”, severe respondis la direktorino.

Pensinte ke kelkaj monbiletoj helpos laŭ kutimo, mi gajnis denuncan prokurto. Per iom pli da monbiletoj, mi liberigis min de tribunalo.

Antonia, princino, kie vi estas?

Ĉu ankoraŭ virga por mi, floreto?

* * *

Io okazis al Panjo. Subite ŝi eksilentis. Ŝi tute ĉesis paroli. Ni maltrankviliĝis.

Dum ŝi promenis, Venia kaj mi traserĉis ŝian ĉambron. En tirkesteto apud la kapuskuso ŝi konservis mortanoncon: *Forpasis en Francio profesoro doktoro Aurelio Link*. Kaj la foto de bonaspekta viro en ŝiaj sesdekaj jaroj.

Tioma tristeco de Panjo signifis ke ŝi neniam gustumis Profesoron Doktoron Fekulon, aŭ kiel li nomiĝis. Eble li estis ŝia inspiranto, ĉar Panjo estis aprezata verkistino esperantlingva. Mi konis la funkciadon de Panjo – ŝi traktis homojn kiel maĝumojn. Kiam ili perdas dolcecon – forsputindaj. Neniam ŝi ploris pro iamaj amantoj.

Ŝi tamen havis kolekton de gazetaj eltranĉaĵoj – mortanoncoj. Inkluzive tiun de mia patro. Ŝi zorge konservis ilin. Foje ŝi parolis kun ili.

Mia Panjo ne estis timigita de Morto – ili du amikiĝis. Morto ĉiam ŝin helpis: Morto ebligis al ŝi posedi nemoveblaĵojn (hereditajn de gepatroj kaj la unua edzo), Morto liberigis ŝin de mia patro, senuti-la kaj ĉiam grumbanta, Morto solvis ŝiajn ŝancelojn plurfoje. Ili du proksimiĝis kaj rilatis agrable. Panjo ŝatis promeni tra la tombejo, kaj ŝi preferis iri buse ol ke ni veturigu ŝin. Tie ŝi revidis kun Morto, eble eĉ amindumis kun ŝi. Sed ĉi-foje Panjo koleris al sia amikino Morto.

Ŝajne Panjo ne rezignis revojn pri tiu kretena profesordoktoro, kun tiu cinika rideto, kun tiuj malnovmodaj okulvitroj. Kial li ne mortis pli frue, por ne turmenti Panjon? Kial li aŭdacis eviti Panjon? Kial li simple ne akceptis esti oferita al ŝia pasio, kiel tiomaj aliaj?

Mi koleris kontraŭ la nekonatulo. Mi koleris ke li aŭdacis morti ĝuste nun, dum mi serĉis Dancistinon. Ĉar mi bezonis la helpon de Panjo. Kaj Panjo silentis senlume.

Por mi estis novaĵo ke Panjo kapablas ami viron. Mi pensis ke ŝi povas nur verki pri sentoj, anstataŭ vere ilin posedi.

Pli ol unu jaron Panjo silentis. Mia fratino Venia komplete perdis la nervojn – ŝi psike malsaniĝis. Nokte ŝi freneze ridadis senkiale.

Tam Venia eliris nuda surstrate. Skizofrenio.

Post ses monatoj en kliniko ŝi revenis dudek kilogramojn pli peza, sed trankvila. Ŝi estis la unua tia kazo en psikiatrio – neniu alian oni sukcese kuracis pro skizofrenio. Sed Venia resaniĝis, edziniĝis kaj naskis sovaĝajn ĝemelojn.

Venia aktorin malsanon. Certe ŝi estis iom freneza, sed veran skizofrenion ŝi neniam havis. Iu estimata doktoro donis tiun diagnozon – ĉar ŝi bone aktorin.

Kiam Venia revenis el la kliniko, Panjo denove ekparolis. "Fenikso mia!" – kaj brakumis sian plej ŝatatan infanon. Ankaŭ Ani aperis, kun kukoj, por bonvenigi la fratinton.

Ekde tiam Panjo kondutis preskaŭ normale. Krom noktaj konversacioj kun Morto.

Dum ŝi silentis, eĉ kun Morto ŝi ne komunikis. Ŝi volis puni nefidelan amikinton per ignorado.

Kaj nun ili kunparolis ĉiun nokton; foje ridis, foje kverelis, foje pridiskutis diversajn problemojn.

La voĉon de sinjorino Morto mi neniam aŭdis. Sed Venia jes.

"Kareseme ŝi parolas, allogo.", priskribis mia fratino.

"Stanislao, fidinda mia filo!", vokis min ordoneme Panjo.

Enirinte en sian mansardon mi trovis ŝin solene vestita, en nubo de luksa parfumo kiun mi kunportis el lasta navigado.

"Stanislao kara, mi iras nun dormi. Sed mi ne vekigos. Ne paniku – salutu ĉiujn; Venian, Anin, Filipon kaj Tonin. Ho – ne troigu, mi nur ŝanĝas la veston, komprenu! Post mia entombigo vi organizos funebran festeton, laŭ kutimo. Tiam – kaj ne antaŭe! – prenu el mia tirkesto leteron, kaj donu ĝin al tiu, kies nomo troviĝas sur ĝi.

Ĉu vi komprenis, Stanislao?"

Al Panjo ne indis iel rezisti.

"Jes, kara Panjo – ĉion mi faros laŭ via deziro.", mi promesis.

Post tri tagoj mi entombigis Panjon.

Trumpetoj ludis "Silenton" – mia snoba frato Filipino tion mendis. Panjo estis kontenta – ĉio glata kaj eleganta.

Apud la ĉerko staris ni, la familio: Venia kun edzo kaj ĝemeloj. Ani kun sia gejo, Filipino kun graveda fiancino, Toni kun sia dikulino kaj kvin filoj. Alvenis amikoj kaj konatuloj, por esprimi la kondolencon.

Tiuj antaŭ la starto de la ceremonio prezentiĝis lasta funebranto; invalidin sur ĉarumo puŝita de monakino. Kiu estas tiu?

Ŝi alproksimiĝis kaj donis la manon al mi: "Mian kondolencon, Stanislao."

Sama infana voĉo, kiel antaŭ dudek jaroj.

Antonia postvivis teruran trafikatan akcidenton kaj perdis ambaŭ kruojn, ĝis la koksoj. Mia Dancistino nun dancas per la manoj.

Mi prenis rozon kaj manplenon da tero kaj jetis en la tombotruon.

"Bonan nokton, Panjo!"

Ni ĉiuj revenis kune en nian hejmon, por la funebro-festo honore al panjo. Mi forsendis la monakinton:

"Ne necesas, ke vi misuzu vian tempon; mi persone prizorgos Antonian kaj revenigos ŝin."

Antonia mute kapijes kaj la monakino foriris.

Antonia restis virga. Nur deksepjara ŝi akcidentis kaj perdis la kruojn. Probable neniu viro havis intereson por ŝi.

"Nur pri vi mi ĉiam pensis" – mi kredis tiujn vortojn ŝiajn.

Kvankam konfuzita, mi ne forgesis la promeson al Panjo; nun venis la momento por malfermi tiun tirkeston.

"Por Antonia" – estis skribite sur blanka kovrilo. Ne, mi ne estis ŝokita – Panjo ja estis sorĉa.

Kun rideto anĝela, Antonia malfermis la leteron. "Mi volas ke vi vidu, Stanislao", ŝi insistis.

En la koverto estis kelkaj monbiletoj, tutviva ŝparo de Panjo, kaj ora medaliono kun engravurita strigo – ĝin Panjo neniam demetis. Mi eĉ pensis ke ŝi kunportis ĝin en la tombon.

"Por vi kaj por la nepoj kiujn vi naskos al mi.

Amas vin Bopatrino"

Mi aĉetis florvendejon.

Mi ne plu iras navigadi, por esti apud mia edzino.

Ŝi bezonas helpon por ĉio.

Ŝi meritas tiun helpon.

Antonia dancas per la manoj.

Kaj per la lipoj.

Kaj per tuta sia korpo fragila.


Sardelojn ni neniam manĝas.

Ankaŭ Antonia malŝatas tion.

Ŝi naskis al mi filinon.

Mia filino nomiĝas Sofia.

Honore al mia Panjo.



Bela kaj aventura kiel la nordo fora (8)

de Marcelle
Deschamps

*Finnlando nun estas
bone konata en
la tuta Eŭropo, sed
ankoraŭ en 1979
ĝi aspektis ekzota al
franca vojaĝantino!
Nur esperanto povis
realigi la magion de
hejma sento en
tute alispeca kulturo.*

Kun alterno de pluvo kaj suno dum du tagoj ni trairis preskaŭ la tutan landon, ĝis la somerdometo de niaj geamikoj Lauri kaj Tuula, en Teisko, proksime de Tampere. Tie ni estis varme akceptitaj, kaj ni konstatis kun suspiro de faciĝo, ke la fifamaj kuljoj ne partoprenas tiun akceptadon: en la sudo de la lando, ili preskaŭ ne ekzistas.

En tre dekliva arbaro laŭ lago, Lauri mem konstruis tre agrablan dometon: rektangula ĉambro, el kiu du flankoj estas apartigitaj per duonvandoj: nokte kurtenoj kaŝas la litojn, tage la falditaj litoj rolas kiel sidlokoj. La malgranda kuirejo en angulo estas tre fatisge meblita: kio plej multe tiris mian atenton estas meblo, kiun oni ne konas ĉe ni: super la lavkuvo pendis ŝranketo, kies internaj tabuloj estas el plasta reto. Kiam oni lavas la manĝilaron, sen bezono ĝin viŝi oni tuj ordigas ĝin en tiun ŝranketon, ĝi sekigas malantaŭ la fermitaj pordoj ĉar la akvo fluas suben kaj je la sekvanta man-

ĝo ĝi estas preta. Jam de deko de jaroj ĉiuj modernaj finnaj kuirejoj havas tiun ŝranketon; mi ne scias, ĉu en aliaj eŭropaj landoj ekzistas tiel praktika meblo?

La du aliaj flankoj de tiu granda ĉambro konsistas el "vitra muro" kun duoblaj vitroj pro la malvarmo, kaj tra ili oni malkovras belegan vidaĵon: parto de la lago meze de la arbaro; mi neniam laciĝis, rigardante tion... Antaŭ la domo, ligna teraso, kies tegmento estas subtenata de pinotrunkoj zorge senŝeligitaj sed kun "komenco de branĉoj", tiel ke oni povas pendigi aĵojn: pluvombrelon, veŝton, ktp. Flanke de la ĉefa ĉambro, malgranda ĉambro: la saŭno. Ligna ŝtuparo kunligas la domon al la lagobordo, kie Lauri konstruis kajon kun someraj mebloj, kaj – kompreneble – ŝipeton. Tiu domo estas la tutan jaron hejmita per aŭtomataj elektraj hejtiloj... eĉ dum julio ili funkcias, ĉar matene kaj vespere estas ofte nur 10° ĝis 15°. Nun Lauri estas konstruanta alian dometon, "somerdometon" sen varmigilo sed kun parto de la tegmento el diafana onda plasto: ĉar li estas pentristo, tie li ricevos bonan lumon por labori, kaj li ankaŭ povos tranoktigi somerajn gastojn. Ĉion li konstruas per pinoj, kiujn li prenas en sia bieneto, kaj kiel li diras: "Vintro multe helpas min, ĉar post vintraj ventegoj multaj grandaj pinoj estas rompita, restas nur al mi segi ilin... sed la ĉefa afero estas, ke dum la ventegoj ili ne falu sur la domon!" Ankaŭ la plankoj, internaj vandoj, mebloj estas el norda pino, kies hela, blonda koloro igas la domojn ege luksaj! Tie, kiel en ĉiuj finnaj domoj, la helaj plankoj estas ŝirmataj per grandaj aŭ mallargaj tapiŝoj el koton, kaj unu el la grandaj – kaj ŝatataj – laboroj de la dommastrino estas "la lavado de la tapiŝoj". Ŝi sin instalas sur la





ligna kajo, surgenue brosas la tapiŝon, kaj poste iras en la lago mem, naĝante ŝi trenas malantaŭ si la sapumitan aĵon. La akvo estas tiel pura, ke post nur kelkaj minutoj la sapo tute malaperas. Tiam ŝi reiras al la kajo, resuprenirigas la tapiŝon, premas ĝin per la piedoj por forigi la akvon, kaj poste ordigas ĝin sur specialaj sekigiloj ĉirkaŭ la dometo. Oni ne povas remi sur lago sen vidi virinon lavantan sur kajo, aŭ tapiŝojn sekigantajn ĉirkaŭ la domoj. En Helsinko mem ekzistas speciala loko, kie la urbaj dommastrinoj povas lavi siajn kotonomatojn.

Ekde nia unua tago ĉe Laŭri, ni konatiĝis kun la ĉefa finna kutimo: la saŭno. Saŭno ne estas nura purigado de la korpo, sed tuta ceremonio. Jam de pli ol mil jaroj tiu kutimo ekzistas. La praloĝantoj konstruis unue la saŭnon, kaj la loĝejon nur poste, kiam ili havis sufiĉan monon, kelkfoje dum jaroj ili vivis en la saŭno mem. Same faris la karelianoj, kiam post la milito ili devis forlasi sian hejmon kaj ricevis bieneton en alia parto de la lando. Eĉ dum la milito ĉe la batalfronto mem la soldatoj konstruis subteran aŭ teran saŭnon, ĉiufoje kiam ili disponis unu aŭ du tagojn, por senti sin pli "hejmecaj". En ĉiuj kampadejoj ekzistas saŭnoj, kaj sur la ŝipoj inter Finnlando kaj Svedujo oni povas saŭni.

Antaŭe la saŭno funkciis ankaŭ por aliaj uzoj: oni tie preparis grenon por fari bieron; oni prilaboris lignojn, oni eĉ – ĉar ĝi estis la plej varma kaj pura ĉambro – flegis la malsanulojn kaj akuŝigis la patrinojn. Multaj el la nunaj finnoj ankoraŭ naskiĝis en saŭno! Tio mirigas min: ekde la tria, kvara semajno ĉiu bebo akompanas sian patrinojn saŭni!

La unuaj saŭnoj nomiĝis "fumsaŭnoj" ĉar la ĉambro ne havis kamen-tubon. Oni bruligis lignon en ŝtona forno sub granda amaso da ŝtonoj, kaj la fumo amasiĝis en la ĉambro, varmigante ĉion. Iompostome ĝi eliris eksteren, ĉu tra ne tute fermita pordo, ĉu tra malgranda truo en la kontraŭa muro. Kiam ĝi estis for, la saŭnontoj eniris. La temperaturo en fumsaŭno atingis 100°-120°, kaj nur 80°-100° en modernaj saŭnoj.

Sed nun ni vidu la disvolvigon de la saŭno-ceremonio:

Unue, mi akompanis Lauri en la arbaro. Li zorgis elektis tre flekseblajn





branĉetojn de betulo. Kiam nia fasketo estis sufiĉe granda, li serĉis pli longan branĉeton, kiun li senfoliigis, konservante nur la pintajn foliojn. Tiam li toridis la branĉeton, ĝis ĝi apartiĝis en lignajn fibrojn kiel ŝnureto. Li ordigis la faskon en bula formo, tranĉis la subajn tigojn, enŝovis en la mezon la lignan ŝnureton kaj per ĝi firme nodligis la tuton: vera fina sainamanto neniam uzas por fari la betulfaskon ion ajn alian ol betulo: nek ŝnuro, nek nilono ktp...

Sed oni bezonas betulfaskojn dum la tuta jaro, kaj la arboj surhavas foliojn dum malmulte da monatoj, oni do devas konservi ilin. Por ke la folioj ne falu dum la sekigo, oni devas kolekti la branĉetojn dum la semajno sekvanta la feston de Sankta Johano. Poste oni sekigas ilin aŭ metas sub salo en grandaj potoj (ĉe ni, niaj avinoj tiamaniere konservis freŝajn fazeolojn!) aŭ nun frostigas en ege malvarma fridujo (por grandaj familioj, kiom da fridujoj oni bezonas?). Kiam oni volas uzi ilin poste, sufiĉas trempi dum kelkaj minutoj en bolanta akvo kaj la fasko tuj retrovas fleksecon kaj bonodoron.

Dum ni estis en la arbaro, Tuula hejtis la saŭnon per lignopecoj. Alno kaj junipero estas la plej ŝataj, ĉar ili bonodoras. Sed mi ankoraŭ ne priskribis la saŭnon: post malgranda ĉambro, kie oni sin senvestigas, estas ĉambreto, kies muroj kaj vandoj estas el hela pino. Dekstre de la pordo, du hejtiloj: sur la unua, grandega kuvo, kie ĉiutage oni varmigas pli

ol cent litrojn da akvo por la hejmaj bezonoj. Sur la dua, granda cilindro plena de ŝtonoj. Kontraŭ la pordo, bretaro el (ĉiam!) pina ligno. Apud la bretoj fenestro, tra kiu oni povas admiri la lagon kaj arbaron. Sub la fenestro, benko kun akvujoj kaj sitelo kun malvarma akvo.

Do nun la saŭno estis sufiĉe varma (ĉirkaŭ 80-90°). Ĉar ni ne estis sufiĉe intimaj, ni saŭnis en du vicoj: viroj kaj poste virinoj, sed finnoj kutimas saŭni ĉiuj samtempe, familie aŭ kun geamikoj. Nur en hoteloj, naĝhaloj kaj publikaj ĉjoj estas du saŭnoj: unu por viroj, unu por virinoj.

Ni – Tuula, la du filinoj kaj mi – eniris, senvestaj kompreneble, kaj sidis sur la supra breto. Tuula de tempo al tempo verŝis per ĉerpilo iom da akvo sur la varmegajn ŝtonojn. Tuj estiĝis granda vapornubo, kaj baldaŭ ŝvito fluis sur nia haŭto. Per la betulfasketo ni batis nin sur la tuta korpo. La celo estas duobla: ĝi plirapidigas la sangofluon, kaj samtempe bonega odoro eliĝas el la folioj.

Post 15-20 minutoj, kiam la ŝvito abundis, ni eliris, malsupreniris la ŝtuparon kaj plonĝis (brtt... nur 17'!) en la lagon por naĝi kelkajn minutojn. Denove en la saŭno, sama ceremonio... ŝvito. Tiam ni nin lavis per sapo kaj varmeta akvo, tralavis nin per akvoĵetojn el sitelo (la akvo libere fluas eksteren en angulo), kaj denove en la lagon. Trian, kvaran fojon ni sidis en la saŭno por ŝviti, dumtempe ni babilis – kompreneble en esperanto –

sed finnoj ankaŭ uzas tiun tempon por mediti kaj malstreĉiĝi rigardante la belan pejzaĝon tra la fenestro. Bona saŭno daŭras unu horon kaj duonon. Post la lasta naĝado, ni vestis nin kaj trinkis glason da fruktosuko, por reaktiri iom de la perdita akvo. Post bona saŭno oni sentas sin renovigita, fizike kaj mense! Kutime finnoj saŭnas dufoje semajne sed... estas ankaŭ pliaj apartaj okazoj por saŭni, kaj volonte oni ilin profitas. ☺



Karaj Feminanoj,

estis agrabila surprizo por mi ricevi okamarte la numeron kun mia artikolo pri la genra gramatiko en Esperanto. Okulfrape trafte konvena ilustraĵo, pli valora ol la artikolo mem. En tiu mi defendas la principon de sufiĉo, kiu postulas uzon de genra afikso nur kiam aperas neceso pri klareco. La sufikso *in* uzindas en titolo ĉe persononomo, kies formo ne rivelas la genron, ankaŭ ĉe vortoj, indikantaj genran paron aŭ ambaŭ-genran proksimuman (intiman) grupon, kiam nuda radikilo ne sufiĉas por indiko de socia (familia, grupa) rolo, paraj rilatoj inter ili, kiam unu sen la alia ne ekzistas (*fianĉ, frat, edz, patr, av, kuz, onkl*), ankaŭ kiam necesas substreki, ke krom *-oj* ekzistas ankaŭ iliaj antonimaj individuoj: ekz. *knab*. Ĉe radikiloj *hom, amik, kamarad, moŝt, legant, aŭskultant, student* tia antonimeco kaj neceso forestas, kaj suplementa genro-indiko aŭ genroamplanko superflua, kaj, kiel rimarkas PIV-2005, foje ankaŭ malĝentilasa...

Via piednota repliko kondukis min al jena formuligo de GE-difino: *Pluralo de ambaŭgenraj proksime (parence, intime) ligitaj personoj*, kiu ŝajnas pli ĝusta ol la difino en PIV. Ja nur unu virino estis allasita al ties kompilado – s-ino Bartovska, kaj eĉ tio kun skandala forlaso de ŝia nomnicio (M.) – pri teksado, nur apogate de kudrotrika terminaro de M. kaj V. Verda (1947).

Tajpante ĉi malkovron mi guglis kaj trafis vikipedian paĝon pri kunlaborintoj de PIV, kaj kun hororo konvinkigis, ke ne nur la virinaro (duono de la mondo), sed la tuta oriento estis ignorata dum la apartisma redaktado de tiu pure okcidenta lingvo-normilo. Neniu gre-

ko, neniu serbo, neniu bulgaro, neniu rumano, neniu baltiano, neniu ruso, japano, hindo aŭ ĉino, koreo aŭ vjetnamo. Kvazaŭ ili ne kompetentas aŭ ne meritas Esperanton. Kia ne nur genra, sed eĉ pli terura genra diskriminado jarcenton post Bulonjo! Mia imago ne ampleksas, ke la redaktora monopolo ekskludis ankaŭ la Sudon – tutajn kontinentojn – Latinan Amerikon, Aŭstralion, Afrikon, tutan hemisferon, ke ĝi ne tuŝu Esperanton, tiun Tok Pisin de Eŭropo. Antaŭ dek jaroj mi eldonis insignon kun verda marstelforma simbolo (laŭ la antidepresia logotipo de la farmacia firmao Lundbeck) kun surskribo **ESPERANTO**

inter?lingvo
EŬROPA

(kun la maldekstra malpinta stelpiedo super Ŭ). Ĉu mi estis prava aŭ naiva – mi ĝis nun ne scias. Sed mi intuiĉias, ke ankaŭ vi sentas kaj konsentas, kioma potencialo da alianco kontraŭ uzurpado kuŝas en tiuj hemisferoj de la globo kaj cerbo, kioman emancipon bezonas la diskriminata multobla duono de la mondo.

Se mi ĝisvivos finvenkan eldonon de PIV, mian eventualan kontribuon al ĝi mi dediĉos al vi, ho mia nekona-ta inspirinto (laŭ principo de sufiĉo mi min detenas de la sufikso *-in-*), anonima aŭtoro de la NdIR.

Valdo Banaitis, Vilno 10 03 2009

Veras, ke la kerna ŝipjo de la PIV-kunlaborantoj konsistas precipe el francoj, sed ŝajne nia leganto restis ĉe la listo de la unua eldono, neglektante tiun de PIV2, kie aperas kelkaj virinaj nomoj, kvankam rezistas sufiĉe mizogina mondpercepto.

Femina
revuo en esperanto ne nur por virinoj

jaro 5, numero 18

posedas FEM
eldonas kaj administras LF-koop

ĉefredaktoro
Perla Martinelli
grafika asisto (kovpaĝoj)
rolfo

kunlaboris
Anjo Amika
Valdo Banaitis
Marie-France Conde Rey
Leen Deij
Marcelle Deschamps
Judith Felszeghy
Leonora Gonzales
Klara
Carlo Minnaja
Chamberline Ngeuefack Zedong
Giorgio Silfer
Etel Zavadlav

Redakcio: <fem@esperantio.net>
Administraj: <lf-koop@esperantio.net>
postadreso: CP 28, CH-2301 Chx-Fds
ISSN 1661-3309

Afriko TIETo, 11 BP 48, Lomé, Togolando

Argentino Inés Beaumont, Beruti 2792 3º 9, C 1425 BFB Buenos Aires

Aŭstralio Libroservo de AEA, 143 Lawson Street, Redfern NSW 2016

Belgio Flandra E-Ligo, Frankrijkple 140, 2000 Antwerpen

Brazilo BEL, SDS Ed. Venâncio III Sala 303 BR-70393-902 Brasília - DF

Britio Hilary Chapman, 8 Vardre View Deganwy, Conwy LL31 9TE

Bulgario Ivanka Kirĉeva Stoyanova, p.k. 701, 9000 Varna

Ĉeĥio Pavel Polnický, Na Vinici 110/10, 290 01 Pobebrady II

Danlando Arne Casper, Bryggervangen 70, 4. tv., 2100 København Oe.

Estonio Eesti Esperanto Liit, Raevoja plats 14, 10146 Tallinn

Finnlando Literatura Foiro, PL 87, 00531 Helsinki – p.k. 800017-70845965

Francio Marie-France Conde Rey, rue d'Alexandrie 3, 16000 Angoulême

Germanio Libroservo Espero, Rolf Beau, Eisserkirchweg 18, 27333 Schwingen

Hispanio Luis Serrano Pérez, Font Nova 32, 08202 Sabadell

Hungario Anna Bartek, Zsili u. 1.111.7, 1093 Budapest

Italio Orbis Pictus, V. Branković, Via Parrini 5, 34129 Trieste

Japanio IEF, via Villorosi 38, 20143 Milano / aŭ rekte p.k. 7262713, Martinelli Perla

Jugoslavia JEI, Wasedamati 1-2-3, Sinzuku-ku, Tokyo-to 162 – p.k. 00130-1-11325

Kroatio Ana Kovač, Djure Djakovića 82, II - 11000 Beograd

Litovio Etel Zavadlav, Lucieva 7, 21000 Split

Litovio Irena Alijošute, Bitininku 2b-11, 08310 Vilnius

Nederlando UEA, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, **konto Ifo!**

Novzelando David Dewar, 24 Date Crescent, Halswell, Christchurch 8025

Pollando Tomasz Chmielik, ul. Jarzebinowa 3/30, 21-040 Swidnik

Rumanio Julia Sigmond, C.P. 200, 400310 Cluj-Napoca-1

Ruslando Halina Gorecka, ab. ja. 1248, 236039 Kaliningrad

Svedio B. Nilsson, Biskop Brasks gränd 25, 176 76 Jarfalla - p.k. 37 47 48-2

Svislando LF-koop, CP 928, 2301 La Chaux-de-Fonds – p.k. 12-11114-5

Usono ELNA, P.O. Box 1129, El Cerrito CA 94530

La abonoj validas por la kalendara jaro.
Internacia abontarifo (IT) 24. EUR. Suplemento por aervoja sendo: 8.- EUR.
Por landoj ne menciitaj sin turni rekte al LF-koop.

REPRODUKTI TEKSTON AŬ BILDON EBLAS NUR POST LA PERMESO DE LA REDAKCIO

- 2 redakcie
Dekkvinde de Majo: Internacia Tago de la Familio
- 3 Leen Deij
Kian familion protektu la Eŭropa Konstitucio?
- 4 spikume
- 5 Klara
Hejma instruado: ĉu rekomendinde?
- 6 Carlo Minnaja
Familio Minnaja, nefacile imitebla modelo
- 8 Perla Martinelli
La familio de Anto Speri: ĉu aŭtente esperanta?
- 10 Amika, Conde-Rey, Felszeghy, Zavadav
Kompasso pretas por beletra orientiĝo
- 11 Marie-France Conde Rey
Kun bona volo, sen brazila karna valo
- 12 Henrik Schück pri Grazia Deledda – tradukis kaj kompletigas Perla Martinelli
La konsola brilo de lumo ne estingebila
- 16 Grazia Deledda – tradukis Giuseppe Lacertosa
El „La patrino“
- 17 Giorgio Silfer
Familiara kiel akvo de l’Rivero
- 18 Leen Deij
Kontraŭvola edzinigo: ĉu ankoraŭ tolerebla?
- 20 Etel Zavadlav
Panjo kaj Morto
- 24 Marcelle Deschamps
Bela kaj aventura kiel la nordo fora (8)
- 27 leterkesto

